

# EL POPOLO

# ĈINIO


中國報道

2

1978



# Nova aspekto de la kamparo



Rikoltado de rizo en la komunumo Tiangōu de Jangtian-gubernio de Guanghi




Gregoj sur la herbejo de Hilingol de Interna Mongolio



Miliono da muoj da kampoj de Saüsan-regiono, Hunan-provinco estas irigaciata de la kanaloj.



Grandskala konstruado de kampoj en Huolu-gubernio de Hebej-provinco



La vinilona fabriko en nokto

## La industrio de Jong-an

Laboristinoj de la plastaja fabriko pakas produktaĵojn.




La gubernio Jong-an de Fugian-provinco situas en montregiono kaj ĝin trairas la fervojo Jingtán-Hiamen. Ĝia industrio montriĝas tre prospera.

La nuna Jong-an havas dekojn da entreprenoj de karbo, feraĵoj, ĉemanto, elektraj motoroj kaj ilmaŝinoj. Ĝi jam povas produkti pli ol 1,000 specojn da produktaĵoj de malpeza industrio kaj metio. La totala produktovaloro de la industrio estas 509-oblo de tiu en la jaroj tuj post la Liberiĝo.

Observante la principon “**preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel gvidan faktoron**”, la gubernio forte akcelis la agrikulturon per disvolvo de la industrio. En la lastaj jaroj la Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj de la gubernio produktis ne nur milojn da akvoradaj pumpiloj kaj diversajn maŝinojn por prilaboro de greno, sed ankaŭ multajn ilmaŝinojn, risortajn martelomaŝinojn, radialajn drilmaŝinojn, rabotmaŝinojn, veldmaŝinojn k. a., per kiuj sin ekipis la riparejoj de agrikulturaj maŝinoj de la 13 popolaj komunumoj de la tuta gubernio.

Kun la rapida progreso de la industrio, la gubernio konstruis pli ol 780 kilometrojn da ŝoseo.



Aŭtomata tubotranĉa maŝino produktita de laboristoj de la maŝinfabrika



Gvidanto de manĝaĵfabriko en laborejo


Ŝpinistinoj interŝanĝas sperton.






En la lagra fabriko

La papera fabriko produktas paperon el kruda materialo de la loko.





Kamionoj produktitaj  
de la aŭtofabriko




La nove konstruita  
hidroelektrujo Anŝa




Geologiaj ekipaĵoj produktitaj de la Erc-prospektora Maŝinfabrika





Ponto konstruita en la  
granda kultura revolucio



Giang Mejhian, vicestrino  
de la revolucia komitato  
de la karbominejo Hiaha,  
laboras kun laboristinoj.



Transportota cemento



Draŝmaŝinoj

Fibraj tabuloj el senutilaj materialoj



# EL POPOLA ĈINIO

中國新聞

1978  
N-ro 2  
(233)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

## KOVRILO:

P. 1. En zorga flegado

P. 4. (1) Hejmenreveno de lernejo

(2) Paŝtado sur altebenaĵo (Ĉinstilaj pentraĵoj de Ĉeng Sifa)



Papertranĉaĵo de GI ĜIGUANG

## Enhavo

Ĝoŭ Enlaj vivos eterne kun siaj meritoj (daŭrigo) . . .	2
Tangŝan en rekonstruado . . . . .	7
Ili estas aparte kapablaj en batalo . . . . .	11
Poŝtista grupo sur altebenaĵo . . . . .	14
Serĉi klasfratojn en Gobio . . . . .	16
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	18, 19, 36
Notoj pri ekspozicio de ludiloj . . . . .	20
Kanto de la Juneco (romano) . . . . .	22
Por sekureco de fremdlandaj amikoj . . . . .	26
Nove ricevitaj libroj . . . . .	27
Korespondi deziras . . . . .	27
Vizito al la urbo Eger . . . . .	28
AMIKECO: Bonvenon al gasto el malproksima lando .	29
ĈINAJ NACIECOJ: La lahu-oj . . . . .	31
ARKEOLOGIA ANGULO: La Hjugiajaŭ-homoj . .	32
KALEJDOSKOPO: Amobirdo . . . . .	35

# Ĝoŭ Enlaj vivos eterne kun siaj meritoj

(Daŭrigo)

## En la Postfronto

**E**N oktobro de 1938, post kiam Vuhan estis okupita de la japanaj agresantoj, Ĉiang Kajšek fuĝis al la postfronto de la Kontraŭjapana Rezistmilito — Ĉongking de Siĉuan-provinco. Por firmigi kaj disvolvi la Kontraŭjapanan Nacian Unuecfronton, Kamarado Ĝoŭ Enlaj, kiel delegito de CK de KPC kaj sekretario de la Suda Buroo de CK de KPC, batalis ĉefe en Ĉongking — la centro de la regiono sub la regado de Kuo-

mintango, de la fino de 1938 ĝis aprilo de 1946. Ankaŭ kamaradoj Je Gianjing, Dong Bivu, Deng Jingĉaŭ kaj aliaj laboris tie por lin helpi. Tiutempe la “Loĝejo de S-ro Ĝoŭ” en Zenggijan, la Oficejo de la Okavoja Armeo en Hongjan kaj la Redakcio de la Ĵurnalo Hinhua en Hualongkiaŭ de Ĉongking tiris al si la atenton de la popolo sub la regado de Kuomintango. De tie disaŭdiĝis la voĉoj de CK de KPC kaj Prezidanto Maŭ, kiuj montris la brilan estontecon al la popolo vualita de nebulo.



*Kamarado Ĝoŭ Enlaj en la Oficejo de la Delegacio de KPC en Zenggijan n-ro 50 de Ĉongking*

*En aŭgusto de 1945, Kamarado Ĝoŭ Enlaj akompanis Prezidanton Maŭ al Ĉongking por traktado kun Kuomintango.*



En la Kontraŭjapana Rezistmilito, Ĉiang Kajŝek batalis pasive kontraŭ la japanaj agresantoj, sed aktive kontraŭ la Kompartio kaj ĉiam sin preparis kapitulaci al la japanaj agresantoj. De 1940 ĝis 1943 li sinsekve levis tri altajn tajdojn kontraŭ la Kompartio. Tiam la vasta popolo de Ĉongking ne povis vidi la perspektivon de la venko en la milito, ankaŭ la patriotaj demokratioj estis turmentitaj de anksieco kaj ne sciis kion fari. Post sia veno al Ĉongking, Kamarado Ĝoŭ Enlaj balais laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ, la venenan influon de la kapitulacisma linio de Vang Ming en la Partio kaj iom post iom disvolvis diversajn laborojn. La sufoka kaj malpura politika atmosfero sereniĝis tagon post tago.

Antaŭ ĉio li restarigis kaj disvolvis la subterajn partiajn organizojn por grandigi la forton de la Partio. Li zorge gvidis la laborojn de jurnaloj, eldonado kaj propagando, disvolvis la progresajn fortojn de la literaturaj kaj artaj rondoj kaj intensigis edukadon al laboristoj, kamparanoj, studentoj kaj urbaj etburĝoj. Samtempe li vaste kontaktis kaj unuiĝis kun kaj faris edukadon al naciaj burĝoj, superaj etburĝoj, mezaj elementoj en Kuomintango, progresemaj sinjoroj, lokaj potenculoj kaj aktivuloj de demokratiaj partioj, por plivastigi la politikan influon de la Kompartio. Li faris pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la grandburĝaro kaj grandbienularo kun Ĉiang Kajŝek kiel ilia reprezentanto, malkaŝis



La skribaĵoj de Kamarado Ĝoŭ Enlaj pri la naciaj martiroj en la Sud-Anhuj-a Evento

ilian intrigon en subfosado de la Kontraŭjapana Nacia Unuecfronto kaj foje-refoje batis ilian kontraŭkomunistan kaj kapitulacan aktivadon.

Kamarado Ĝoŭ Enlaj persone gvidis la laboron de la ĵurnalo "Hinhua". Li diris: "La ĵurnalo 'Hinhua' estas standardo de persistado en la Kontraŭjapana Rezistmilito, unuiĝo kaj progreso en la regiono regata de Kuomintango. Ĝi devas esti proparolanto de la postfronta popolo, kuraĝe kaj lerte eldiri la veron." En ĝia aperado de 9 jaroj kaj pli ol unu monatoj de la 11-a de januaro, 1938 ĝis la 28-a de februaro, 1947, la kuomintanga reaktularo kovis ĉiajn intrigojn por ĝin subpremi, blokadi kaj persekuti, kaj fine kontraŭleĝe malpermesis ĝian aperon. Sed, sub la gvido de Kamarado Ĝoŭ Enlaj ĝi ĉiam persistis en propagando pri la principo kaj politikoj de la Kompartio, raportado pri la produktado kaj konstruado de la liberigitaj regionoj kaj pri la brava kaj persista batalado de la Okavoja Armeo kaj la Nova Kvara Armeo sub la gvido de la Kompartio kontraŭ la malamikoj. Ĝi unuigis la demokratiajn partiojn, progresemajn personojn kaj vastajn popolamasojn, malkaŝis la reakcian regadon de Kuomintango kaj ĝiajn pasivan militadon kontraŭ la japanaj agresantoj kaj aktivan oponadon kontraŭ la Kompartio, kaj mobilizis centmilojn da popolanoj de la regionoj regataj

taj de Kuomintango al obstina batalo kontraŭ la reaktularoj de Usono kaj Ĉiang-Kajšek-kliko.

En 1941, Ĉiang Kajšek levis la duan kontraŭkomunistan altan tajdon. En januaro, kiam la Nova Kvara Armeo atingis la sudan parton de Anhuj-provinco en sia devigita translokiĝo al la nordo, reakciaj kuomintangaj trupoj subite sieĝis kaj surprizatakis tiun armeon brave batalantan kontraŭ la japanaj agresantoj. La pli ol 9,000 batalantoj de la armeo heroe batalis sep diurnojn, kaj plejparto martiriĝis pro elĉerpiĝo de municio kaj greno, kaj nur pli ol mil el ili sukcesis trarompi la sieĝon. La armeestro Je Ting estis vundita kaj kaptita. Tio estas la Sud-Anhuj-a Evento, kiu skuis la tutan Ĉinion kaj la mondon.

La 11-a de januaro, 1941 estis la tria datreveno de la fondiĝo de la ĵurnalo "Hinhua". En la vespero okazis celebrado en la manĝejo de la redakcio, Kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Je Gianjing kaj aliaj venis tien por festi. Kiam Kamarado Ĝoŭ Enlaj parolis en la celebra kunveno, li ricevis urĝan telegramon pri la Sud-Anhuj-a Evento. Li tuj anoncis tion al ĉiuj ĉeestantoj. Ĉiuj senkompare malĝojis kaj indignis. Li signifoplene stimulis la ĉeestantojn, dirante: "Kamaradoj, la mallumo estas provizora kaj la lumo certe venos!" Kaj li aldonis: "Tiuj, kiuj spertas en revolucia batalo, scias kiel batali en lumo kaj mallumo. Ili ne fieras en lumo, kaj pli grave, ne deprimiĝas en mallumo. Se nur ni ĉiuj insistos pri nia kredo, batalos malgraŭ ĉiaj malfaciloj kaj manifestos en la mallumo nian bravan batalan spiriton, la venko certe alvenos kaj la mallumo certe estos venkita."

Tiun nokton, kiam Kamarado Ĝoŭ Enlaj informiĝis, ke en la sekvonta tago Ĉiang Kajšek anoncos "perfidon" de la Nova Kvara Armeo kaj nuligos ĝian nomon, li tre indigniĝis. Por malkaŝi la kontraŭrevoluciajn intrigon kaj krimon de Ĉiang, li malĝoje skribis jenajn funebrajn vortojn: "Funebro pri la naciaj martiroj en la sudo de Jangzi-rivero" kaj jenan skribaĵon:

*Senprecedenca maljusteco de jarmiloj  
Al la Folio\* sude de l' Rivero.  
Fratojn mortigas fratoj de la sama domo.  
Ho ve! kun kia senkoreco kaj kruelo!*

Tuj poste li sendis ilin al la redakcio de la ĵurnalo. Ĉiuj oficistoj kaj laboristoj de la ĵurnalo estis mobilizitaj al rapidaj presado kaj dissendo de la ĵurnalo antaŭ la tagiĝo.

La vortoj malkaŝis la esencon de la Sud-Anhuj-a Evento, prezentis fortan proteston al la kuomintangaj reakciuloj kaj akuzis Kuomintangon pri ĝia sanga krimo al la popoloj de Ĉinio kaj la mondo. Frumatene de la sekvanta tago, ĉie en Ĉongking oni klopodis por havigi al si la ĵurnalon "Hinhua". Kiam la ĵurnalo "Gongjang-jibaŭ", en kiu publikiĝis la reakcia dekreto de Kumintango, atingis la manojn de la legantoj, oni jam bone konis la fakton. La spionoj, policanoj kaj ĝendarmoj de Kuomintango konsterniĝis, ĉie persekutis kaj arestis ĵurnal-knabojn de Hinhua-ĵurnalo kaj konfiskis la ĵurnalojn. Kamarado Ĝou Enlaj iris al la Ĝendarma Komandejo kun siaj laborantoj kaj prezentis seriozan proteston. Pro la rezoluta batalo, Kuomintango devigite liberigis la arestitajn ĵurnal-knabojn kaj redonis la konfiskitajn ĵurnalojn. Kune kun siaj laborantoj li survoje disdonis la ĵurnalojn kaj revenis al sia loĝejo en plena venko.

Post la Sud-Anhuj-a Evento, la politika situacio tre streĉiĝis. La kuomintanga reakciularo praktikis severajn kontrolon kaj blokadon al la Oficejo de la Okavoja Armeo kaj la Redakcio de la ĵurnalo "Hinhua". Kamarado Ĝou Enlaj prezentis al Kuomintango seriozan proteston kaj faris rektan batalon kontraŭ ĝi; kaj samtempe li malkaŝis la kontraŭkomunistan intrigon de Kuomintango al la demokratiaj partioj kaj personoj, alvokis ilin persisti en la Kontraŭjapana Rezistmilito, en unuiĝo kaj progreso, dissendis progresemajn personojn al sekuraj lokoj, ŝirmis la subterajn partiajn organizojn kaj aplikis urĝajn rimedojn por sin prepari al surprizatako de Kuomintango al la oficejo kaj la redakcio.

Neforgeseblaj estas la tagoj en kiuj Prezidanto Maŭ faris pacan traktadon, post sia alveno al Ĉongking. Post kiam la japanaj agresantoj kapitulacis en aŭgusto de 1945, por rabi la fruktojn de la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj gajni tempon por finaranĝi la dispoziciojn de la enlanda milito, Ĉiang Kajŝek faris

artifikon de "paca traktado" sub la direktado de sia usona mastro kaj per tri telegramoj invitis Prezidanton Maŭ al Ĉongking por "kune konsiliĝi pri gravaj ŝtataj aferoj". Por malkovri la artifikon de Ĉiang Kajŝek, Prezidanto Maŭ venis al Ĉongking je la 28-a de aŭgusto por la traktado.

La informo pri la alveno de Prezidanto Maŭ al Ĉongking disvastiĝis tra tiu monturbo kiel printempa zefiro. Tiam en Ĉongking cirkulis la diro "Se la vojo estas sen eliro, iru al Maŭ Zedong por konsilo". La alveno de Prezidanto Maŭ portis al la popolo lumon kaj esperon. Sed tio estis tute neatendita de Ĉiang Kajŝek. Li faris nenian preparon, tial ĉiuj projektoj por la traktado estis elmetitaj de KPCĉ dum la kuomintangaj reakciuloj nur povis trakti tion pasive. La reprezentantoj de KPCĉ sub la gvido de Prezidanto Maŭ faris plurfojaĵajn traktadojn kun la kuomintangaj reprezentantoj. Post intensaj bataloj, Ĉiang Kajŝek konsentis, sub en- kaj eksterlanda premado, la principon de paco kaj unuiĝo

*Gekamaradoj Ĝou Enlaj kaj Deng Jingĉaŭ en la Oficejo de la Okavoja Armeo de Ĉongking en 1939*



kaj devigite subskribis kun KPC la "Resuman Protokolon de la Interparolado inter la Representantoj de Kuomintango kaj la Komunista Partio de Ĉinio". Tio ĝisfunde frakasis la mensogon de Kuomintango, ke la Komunista Partio de Ĉinio ne volas pacon kaj unuiĝon. KPC gajnis plian simpatian kaj subtenon de la tuta popolo.

Krom helpado al Prezidanto Maŭ en la traktado kaj vasta kontaktado kun personoj de diversaj rondoj, Kamarado Ĝoŭ Enlaj ankaŭ faris zorgan aranĝon por la sekureco, sano kaj vivo de Prezidanto Maŭ. Kiam Prezidanto Maŭ tranoktis en la loĝejo Linjuan de Ĉiang Kajšek, Kamarado Ĝoŭ Enlaj ĉiam restis ĉe li kaj mem gvidis la gardan laboron. Poste Prezidanto Maŭ translokiĝis en la duan etaĝon de la domo de la oficejo en Hongjan, kaj Kamarado Ĝoŭ Enlaj translokiĝis en la ĉambron kontraŭ tiu de Prezidanto Maŭ.

Post kontraktado de la protokolo, dank' al zorga aranĝo de Kamarado Ĝoŭ Enlaj, Prezidanto Maŭ sekure revenis al Jan-an per aviadilo.

Kamarado Ĝoŭ Enlaj restis en Ĉongking por daŭrigi la traktadon kun Kuomintango kaj devigis Ĉiang Kajšek kontrakti pri armistika interkonsento je la 10-a de januaro de 1946, kaj okazigi la Politikan Interkonsiliĝan Konferencon, kiu akceptis kvinpaktan konvencion favoran al paco kaj demokratio. Ĉiang Kajšek tiam unuflanke utiligis tiujn kontraktojn por fari trompadon kaj aliflanke sin preparis al kondukado de landskala enlanda milito. Giaŭĉangkoŭ-Evento okazinta en la 10-a de februaro plene malkaŝis la kriman celon de Kuomintango. Tiu-tage, kiam diversrondaj personoj de Ĉongking okazigis kunvenon por celebri la venkan fermiĝon de la Politika Konsiliĝa Konferenco en Giaŭĉangkoŭ, kuomintangaj spionoj sieĝis la kunvenejon kaj batvundis Guo Moĵuo, Li Gongpu kaj aliajn. Informiĝinte pri tio, Kamarado Ĝoŭ Enlaj tuj rapidis al tiu loko, solide riproĉis la fiagon de la reakciuloj kaj venis al hospitalo por konsoli la vunditojn. Post tio la kuomintangaj reakciuloj faris kontraŭsov-

unian kaj kontraŭkomunisman manifestacion, detruis la vendejon de Hinhua-jurnalo kaj eĉ senhonte sendis al Kamarado Ĝoŭ Enlaj minacan leteron kun pistola kuglo. Kamarado Ĝoŭ Enlaj prezentis protestojn al Kuomintango kaj publikigis la faktojn de tiuj fiagoj al la diversrondaj personoj kaj la vastaj popolamasoj.

En la tempo kiam kamaradoj Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj restis en Ĉongking, la medio estis tre danĝera. En la ĉirkaŭaĵo de la loĝejo estis multaj spionoj, kiuj severe supervidis ĉiujn enirantojn kaj elirantojn. Ĉiuj iliaj aktivadoj estis limigitaj kaj eĉ subfositaj, iam la reakcia instanco ensendis homojn por esplori ilian loĝejon, pretekstante ekzameni la loĝantecon. Sed, sub la gvido de Kamarado Ĝoŭ Enlaj kun riĉa sperto de batalo, utiligante diversajn publikajn kaj sekretajn rimedojn, liaj laborantoj faris kuraĝajn kaj sagacajn batalojn kontraŭ la spionoj kaj disdonis grandan kvanton da kontraŭjapanaj propagandaĵoj.

En Ĉongking la batalo estis akra kaj komplika, kaj la vivo tre malfacila. Japanaj aviadiloj ofte alflugis por bombado, kaj la Oficejo de la Okavoja Armeo kaj la loĝejo de Kamarado Ĝoŭ Enlaj estis bombitaj. La domo de KPC-delegacio estis tre malsufiĉa. En varmega somero, Kamarado Ĝoŭ Enlaj laboris aŭ verkis artikolojn, sidante ĉe la aperturo de la kontraŭaerataka tunelo, kaj starigis tie matobudon por akcepti gastojn ĉinajn aŭ fremdlandajn. En tia stato li ankoraŭ persone gvidis la laborantojn en lernado de partiaj dokumentoj kaj eksplikis la historion de batalo inter la du linioj en la Partio. Tage li akceptis gastojn kaj okazigis kunvenon en sia loĝejo, nokte revenis al la Oficejo de la Okavoja Armeo kaj laboris ĝis profunda nokto. Por la afero de la Partio kaj la liberigo de la ĉina popolo, Kamarado Ĝoŭ Enlaj pasigis tie multajn noktojn maldorme.


(Daŭrigota)

\* Folio: *Ĉine Je. Je estas la familia nomo de Je Ting, la komandanto de la Nova Kvara Armeo.*



# Tangŝan en rekonsstruaĉo

de NIA RAPORTISTO



**E**N oktobro de 1977, post la Nacia Festo mi veturis al Tangŝan per rapida trajno n-ro 165. Tangŝan estas pezindustria urbo je 262 kilometroj for de Pekino kaj tie troviĝas famkonata Kajluan-karbominejo.

Je 42 minutoj de la tria horo frumatene de la 28-a de julio, 1976, okazis tie granda tertremo malofta en la historio. En mallonga tempodaŭro de kelkdek sekundoj ĝi ruinigis la “Ĉinan Karbourbon” kun historio de pli ol 100 jaroj. Plejparto de ĝiaj konstruaĵoj falis kaj multegaj homoj mortis. Tiam iuj diris: “Tangŝan estas forstrekita de sur la terglobo!”

Post la tertremo nia revuo iam koncize raportis la batalon de la Tangŝan-a popolo kontraŭ la tertrema katastrofo. De tiam pasis jam unu jaro kaj kvar monatoj. Kiel la urbo nun statas?

## Sur la Feniksa Monto

Nia trajno atingis la Tangŝan-an Fervojan Stacion precize je 18 minutoj de la dua horo posttagmeze. Elvagoniĝinte mi iris rekte al la centro de la urbo. Sur stratoj galopis diversaj aŭtoj, kaj fluis nekalkuleblaj bicikloj kaj ĉevalĉaroj. Ĉe Giefang-strato en Lunan-kvartalo kaj ĉe Venhua-strato en Lubej-kvartalo, la vendejoj de ĉiutagaj bezonaĵoj, porcelanaĵoj, manĝaĵoj kaj fruktoj, librejoj, apotekoj, fotografejoj, restora-

cioj kaj legomvendejoj estas vizitataj de amasoj de klientoj. Ĉe la piedo de la Feniksa Monto en la urba centro mi informiĝis el afiŝoj, ke en la Tangŝan-a Laborista Kultura Palaco kaj aliaj kinejoj kaj teatroj estas prezentataj muzikoj kaj dancopero fare de la Tangŝan-a Ensemblo, pekinopero “La Societo de Glavoj” de la Tangŝan-a Pekin-opera Trupo, kiu priskribas la kontraŭimperiisman kaj kontraŭfeŭdisman batalon de la ĉina popolo, kaj ĉina filmo “Hodiaŭ Mi Ripozas” kaj jugoslava filmo “Varter Defendas Sarajevo” . . .

Post kiam mi mendis dormejon en hotelo, mi iris al la Feniksa Monto. De malproksime mi jam vidis la Okangulan Kioskon sur la montpinto. Ĝiaj ruĝaj kolonoj, flave glazuritaj tegoloj kaj supren turnitaj tegmentanguloj brilas en la suno. En la granda tertremo de la pasinta jaro, ĝi mirakle restis kaj fariĝis unu el la multaj nefalintaj konstruaĵoj de la urbo. Nun ĝi, kiel simbolo de la heroa Tangŝan-a popolo ne timigebla eĉ de ĉielfalo, majeste staras sur la montpinto kaj allogas al si multajn ekskursantojn. . .

Laŭ la zigzaga ŝtonŝtupara vojeto mi senhalte grimpis sur la plej altan lokon de la Feniksa Monto. De tie mi vidis, ke surteraj konstruaĵoj de la unua kaj dua ŝaktoj de la Tangŝan-a Kar-

bominejo kun alteco de 50 metroj aspektas aparte imponaj en vespera krepusko. En orienta parto de la urbo, la Tangŝan-a Fera-Ŝtala Fabriko, Tangŝan-a Cementa Fabriko kaj Tangŝan-a Porcelana Fabriko jam rekomencis sian produktadon. La du grandaj malvarmigaj turoj de la Tangŝan-a Termoelektrejo post la monto sputadas blankan vaporon, kiu ŝvebas kvazaŭ delikata tulo. Okcidente de la Feniksa Monto estas la centro de la konstruata nova Tangŝan, kie la stratoj estas borderitaj de prosperaj arboj kaj troviĝas du altaj lernejoj nome la Hebej-a Minerala kaj Metalurgia Instituto kaj la Hebej-karbomineja Medicina Instituto, kaj ankaŭ la Tangŝan-a Instruista Lernejo.

Tangŝan daŭre staras sur la terglobo, sur la Nordĉinia Ebenajo kaj ĉe la marbordo de Bohajgolfo. Kvankam la ruinoj estigitaj de la tertremo estas ankoraŭ ne tute forigitaj kaj altaj civilaj loĝdomoj ankoraŭ ne konstruitaj pro posttremoj, tamen nun tiu industria urbo jam sin trovas en rapida restarigo de produktado kaj ĉie prezentiĝas vicleplena rekonstruado de la hejmloko.

## Komerco post la tertremo

Kiam nokta kurteno falis sur la teron, mi iris promeni sur stratoj. La granda tertremo faligis preskaŭ ĉiujn domojn de Tangŝan escepte de

oketaĝa domo de Hinhua-hotelo, kiu tiam jam finkonstruiĝis, tamen ankoraŭ ne estis uzata. Tamen plejparto de ĝiaj muroj estis detruitaj. Nun magazenoj, restoracioj, apotekoj kaj manĝajbutikoj oriente kaj okcidente de la hotelo laboras eĉ en nokto.

En la sekvanta tago mi vizitis la Komercan Administracion de Tangŝan por informiĝi pri ĝia laboro post la tertremo.

Vicestro de la administracio Vej kaj sekciestro Liu Gingtian akceptis min. Laŭ mia peto ili faris jenan prezentadon:

Antaŭ la tertremo en Tangŝan troviĝis 572 grandaj kaj malgrandaj vendejoj, restoracioj kaj hoteloj, kaj ili ĉiuj estis ruinigitaj de la tertremo. El la pli ol 23,000 oficistoj kaj laboristoj de ili mortis pli ol 4,000, t. e. 18.5% de la totalo.

Post la tertremo 120,000 kubmetroj da ruinaĵoj estis forigitaj kaj ĝis la fino de septembro de 1977 restariĝis 485 vendejoj kaj servaj punktoj kaj la specoj de la liveritaj varoj atingis pli ol 6,000, preskaŭ egalajn al tiuj antaŭ la tertremo. La kvanto de la venditaj komercaĵoj en la periodo de januaro ĝis septembro de la lasta jaro estis 74.2% de tiu difinita de la tutjara plano kaj 92% de tiu de la sama periodo de 1975.

Dank' al provo de la tertremo multe ŝanĝiĝis la spirita fizionomio de la komercaj laborantoj. Tio montriĝis ne nur en bona servado al klientoj, sed ankaŭ en tio, ke ĉiuj butikoj meminciate longigis sian servtempon kaj aldone funkciigis sekciojn por servi al klientoj diurne. Krome ili funkciigas rondirajn var-ĉarojn por oportuno de la urbanoj.

Post la tertremo ĉiuj vendistoj de Tangŝan klopodas por plibonigi sian servadon. Ili elmetis la sloganon "Ni sendu varman prizorgadon de la Partio al ĉiuj familioj per

*Rondira Butiko*



En magazeno



nia laboro". Nun la restoracioj kaj legomvendejoj de la urbo sendas manĝaĵojn kaj legomojn al la hejmoj de vunditoj kaj la apotekoj preparas dekoktaĵojn por pacientoj.

Kompreneble ĉio ĉi tio multe longigis la laboran tempon de la komizoj, tamen ili sentas en tio grandan ĝojon. Ili preferas oferi iom da sia tempo por servi multe al la klientoj. Tiu spirito estas netaksebla per mono.

## Hinŝikju-restoracio

La nomita restoracio havas 4 vendejojn kaj 7 agentajn manĝejojn kun 203 laboristoj kaj oficistoj. La agentaj manĝejoj estas funkciigataj de loĝantoj kaj provizitaj de la restoracio per rizo, faruno, viando kaj oleo. Ili mem faras manĝaĵojn kaj respondecas pri la propraj profitoj aŭ perdoj en mastrumado.

La restoracio estas kompare granda en Tangŝan. Antaŭ la tertremo ĝi ĉiutage forkonsumis 5,000 kilogramojn da faruno, kaj post la tertremo la konsumo kvanto de faruno jam atingis 10,000

kilogramojn. La kialo kuŝas ĉefe en tio, ke multaj homoj havas malfacilon en preparado de manĝaĵoj post la tertremo, kaj la manĝaĵoj de la restoracio, kiel ekzemple pasteĉoj, panoj, patkukoj k. a. estas bongustaj kaj malmultekostaj.

Kiam mi venis al la nomita restoracio, jam estis tempo por tagmanĝo. La manĝotabloj ĉiuj estis okupitaj de klientoj. Iuj estis trinkantaj bieron produktitan de Tangŝan kaj sur la tabloj estis metitaj teleroj da frikasita viando, fritita porka hepato, diversaj malvarmaj viandopladoj k. a. Unu telero da frikasita viando kostas nur 0.5 juanon. La manĝantoj plejparte estas laboristoj, inter kiuj multaj apartenas al Kajluan-karbominejo, kiu havas entute pli ol 100,000 laboristojn kaj oficistojn.

Kamaradino Hiaŭking de la Komerca Administracio, kiu akompanis min al la restoracio, estas 24-jara knabino. Antaŭ nelonge ŝi diplomigis el la Vinfara Fakultato de la Tiangin-a Malpezindustria Instituto. Konsiderante, ke ŝia hejmo estas en Tangŝan, la gvidantoj sendis ŝin labori en la nomita administracio.

Ni venis al la oficejo de la restoracio. Nin akceptis Kamaradino Vang Cujjing, ĵus promociita vicsekretario de ĝia partia filio. Ŝi estas malalta junulino 26-jara, tamen montris sin tre sperta en la interparolo. En la tertremo ŝiaj patrino kaj pliĝa frato mortis kaj restis nur ŝi kaj ŝia pli juna frato. Mi iris viziti la restoracion, ĉar ĝi estas famkonata pro sia bonega servado. Tamen mi ne atendis, ke ĝia vicsekretario estas tiel juna knabino, kiu trafis grandan malfeliĉon. Mi pensis pretervole: Malfaciloj ja hardas homojn!

Krom servo al la klientoj tage kaj nokte, la restoracio ankaŭ mem konstruas domojn, ĉar la antaŭaj domoj ĉiuj estis faligitaj de la tertremo. Nur escepte de kelkaj manĝoĉambroj kaj kuirejoj, kiuj estis konstruitaj helpe de ĈPLA-anoj, ĉiuj aliaj domoj estis konstruitaj de laboristoj kaj oficistoj de la restoracio mem.

Alia laboro de la restoracio estas sendi manĝaĵojn al hejmoj de vunditoj, kiuj iras malfacile. Ili instalas kartojn por registri la nomojn kaj adresojn de la vunditoj en ilia distrikto. Por bone fari tiun laboron ili fondis 8 "grupojn de lerno de Lej Feng" kun membroj de la Junulara Ligo kiel kerno.

Iun tagon mi kune kun Vang Cujjing kaj alia 20-jara komizino Hu Baŭjuj iris al la hejmo de

Van Jongĉeng fore de la restoracio je 10-minuta vojo. Van Jongĉeng estas emerita laboristo de Kajluan-karbominejo. Lia edzino forpasis antaŭ longe. Tri el liaj infanoj mortis en la tertremo kaj ankaŭ li mem vundiĝis je la talio. Tage lia unu nura filo kaj la ĵus edziniĝinta bofilino devas labori, do restas neniu dome por prepari tagmanĝon al li. En la pasinta unu jaro lia tagmanĝo estis sendita ĉiutage de Hu Baŭjuj kaj pro tio la maljunulo tre dankas ŝin. Kun emociaj larmoj li diris al mi: "Miaj tri infanoj mortis pro la tertremo, tamen ili (Vang Cujjing kaj Hu Baŭjuj) estas miaj filinoj, kiuj donas al mi tre bonan zorgon."

Mi aŭdis ankaŭ alian rakonton:

Antaŭ unu jaro, al la restoracio ĉiutage venis pli-ol-30-jara kliento kun trimonata bebo en la brakoj por tagmanĝi. Evidente, ili estas patro kaj filo. La patro estis ne nur malpure vestita, sed ankaŭ kun longe ne tondita hararo. Kio okazis al ili?

Post pridemando oni eksciis, ke la viro nomiĝas Ŝi Juĝa, havas 36 jarojn kaj estas laboristo de la maŝinriparejo de la Kajluan-a Karba Instituto. Lia edzino mortis en la tertremo. Kun forta sopiro al sia edzino li decidis bone varti la bebon. Tamen li ne estas lerta en tio. Ĉiutage li devis nutri la bebon per bovinlakto, lavi ĝiajn



*En la unua laborejo de la Tangŝan-a Tria Porcelanaja Fabriko*

vestojn kaj urintukojn, bani ĝin, prepari manĝaĵojn kaj iri labori, do kiel li povis trovi tempon por sin purigi. Informiĝinte pri tio, komizinoj de la restoracio opiniis, ke ili devas helpi lin por solvi liajn malfacilojn. Iun tagon tri feriantaj komizinoj iris al la hejmo de Ŝi Jufa. Ili klarigis al li sian intencon kaj samtempe atente observis la ĉambron. Ho, kia malordo! Verŝajne la litkovriloj ne estis lavitaj jam plurajn monatojn kaj urintukoj de la bebo kuŝis ĉie. Por iri labori, ĉiutage Ŝi Jufa konfidas sian infaneton al la najbarino. Post labordeĵoro li devis unue repreni la infaneton kaj ankaŭ prepari manĝaĵojn, kompreneble li ne havis tempon por ordigi la ĉambron. La tri komizinoj lavis por li la litkovrilojn, vestojn kaj urintukojn de la bebo, kaj purigis kaj ordigis la ĉambron. Tute ŝanĝiĝis lia hejmo sub la diligentaj manoj de la komizinoj. Ĉe adiaŭo ili diris al li, ke ĉiutage ili trifoje sendos al li manĝojn, kaj li antaŭe sciigu ilin kion li volas manĝi. Kaj ili ankaŭ promesis helpi

lin en flikado kaj lavado de vestoj ĝis fondiĝo de infanvartejo.

Post unu jaro, al la restoracio venis du gastoj, el kiuj unu estis la sindikata prezidanto de la maŝinriparejo, kie laboras Ŝi Jufa, kaj la alia estis la estro de la loĝantara komitato de la strato, kie loĝas Ŝi Jufa. La unua venis speciale por esprimi dankon al la restoracio. Li diris, ke dum la pasinta unu jaro Ŝi Jufa laboris kun granda entuziasmo, tamen antaŭe li ofte malfruiĝis pro hejmaj laboroj. Tiun ŝanĝigon Ŝi Jufa ŝuldis al la nobla kvalito kaj bona servado de la laborantoj de la restoracio. Tio ankaŭ edukis la laboristojn kaj oficistojn de la tuta fabriko kaj pro tio la sindikata prezidanto venis por esprimi dankon.

En Tangŝan pliboniĝis la rilatoj inter homoj post la tertremo.

(Daŭrigota)

# Ili estas aparte kapablaj en batalo

de HONG JING

**K**AJLUAN-karbominejo havas la historion de preskaŭ 100 jaroj. En la periodo de socialisma konstruado ĝi estas unu el la avangardaj entreprenoj en lernado de Daking en industrio. En la jaro 1975 de la periodo de la Kvara Kvinjara Plano de nacia ekonomio, la produktokvanto de tiu karbominejo atingis duoblon de tiu permesita de projekto. Kiam ĝiaj laboristoj kaj oficistoj klopodis por atingi pli altan produktonivelon, malofta tertremo okazis en la 28-a de julio de 1976. Serioze difektiĝis la surteraj konstruaĵoj kaj la ekipaĵoj en la ŝaktoj. Pro rompiĝo de elektra kurento, akumuligis en la ŝaktoj multe da akvo. La ministoj de Kajluan kun glora revolucia tradicio faris mirindan klopodon por

solvi la grandajn malfacilojn. Ili faris urĝan riparadon, drenis la stagnan akvon kaj rapide rekomencis produktadon. Ekz., la karbominejo Magiagoŭ rekomencis produkton de karbo en la deka tago post la tertremo. Je la fino de 1977, la produktokvanto de Kajluan-karbominejo jam atingis la nivelon antaŭ la tertremo.

Mi venis al la karbominejo Ĝaŭgeĝuang, la plej granda el la minejoj de Kajluan. La akompananto kamarado Ŝu kaj mi unue venis al la laborista loĝkvartalo. Tie la antaŭaj domoj plejparte disfalis en la tertremo. La nunaj domoj havas preskaŭ saman aspekton: la malsupra parto de iliaj muroj estas brika, la supra parto kaj la

tegmento estas faritaj el malpezaj materialoj kaj asbestaj tegoloj. La interno de la domoj estis kalkita. En Tangŝan oni konstruis tiajn domojn kun ĉ. 400,000 ĉambroj.

Antaŭ vico de tiaj simplaj domoj ni renkontis altastaturan, fortan kaj maljunan ministron kun densaj brovoj kaj kvadrata vizaĝo. La akompananto salutis lin, diris mian intencon kaj poste konigis lin al mi: "Li estas Majstro Ĉen Ŝuhaj. La tertremo fermis lin kaj liajn 4 kolegojn en ŝakto, kie ili pasigis 15 diurnojn, sed fine ili elsaviĝis." Mi aliris kaj manpremis kun li, kaj li diris: "Hodiaŭ mi laboros en nokta skipo. Mia hejmo estas post ĉi tiuj, bonvolu iri iom ripozi ĉe ni." Sekvante lin, ni ĉirkaŭiris vicon da simplaj domoj kaj venis al lia domo. La ĉambro estas sunbrila, bonorda, pura kaj simple meblita. Majstro Ĉen varme petis nin sidigi kaj mi petis lin rakonti pri la 15 neordinaraj diurnoj.

Tio okazis post la tria horo matene de la 28-a de julio 1976. La skipo de Ĉen Ŝuhaj laboris en la deka galerio je iom pli ol mil metroj profunde sub la tero, subite ili sentis fortan skuigon sub la piedoj, kaj samtempe kun bruego ĉiuj elektraĵ lampoj estingiĝis, en la galerio ruliĝis nebulo de karba polvo kaj falintaj karbopecoj ŝtopis la galerion.

Kio okazis?

La kvin laboristoj de la skipo tuj kolektiĝis. La maljuna skipestro Ĉen Ŝuhaj tuj konsciis, ke okazis granda tertremo, kaj se ili ne tuj klopodos por iri el la mallarĝa laborsektoro, ilia vivo estos en danĝero. Li konsiliĝis kun la kvar kolegoj kaj decidis bori truon malsupren por eliri. Sed la galerio estas tro mallarĝa, kaj ili ne povis uzi ŝovelilon, ili do fosis en la karbotavolon per siaj kaskoj. Post multa klopodo ili fine faris truon. Sed ili trovis ke ankaŭ la suba galerio estis ŝtopita. Ili devis fosi supren truon kun profundeco de 8 metroj. Ili elrampis unu post alia, sed ankaŭ la supra trapasejo estis ŝtopita de ŝtonoj. Sed tie ili ne povis resti longe, pro manko de elektro la akvo en la ŝakto ŝveliĝis senĉese, kaj se ili ne iros supren, ili estos glutitaj de la akvo. Jam estis la tria tago post la tertremo, ili nenion manĝis kaj estis tute lacigitaj. Ĉen Ŝuhaj kuraĝigis siajn kolegojn: "Firme

persistu, la gvidantoj certe sendos serĉi nin. Ni nepre eliros vivaj." Dank' al lia instigo ili alterne fosis unu tagon, fosis truon, tra kiu ili venis en la naŭan galerion.

Je la kvara kaj duona horo de la 30-a de julio, ilia lasta ministra lampo estingiĝis, kaj de tiam ili ne plu povis vidi horloĝon kaj scii la tempon.

Ripozinte iom da tempo, ili daŭrigis la supreniradon. En la malluma galerio ili nenion povis vidi. La kvinopo palpe antaŭen iris manon en mano en unu kolono. Ĉen Ŝuhaj iris fronte, la plej junaj el ili Li Baŭhing kaj Vang Venjoŭ iris en la mezo, Maŭ Donggian kaj Vang Ŝuli ĉe la fino. Ĉen Ŝuhaj, kiu laboris en ŝakto pli ol 30 jarojn, paŝon post paŝo venis al la trapasejo inter la 9-a kaj 8-a galerioj, irante laŭ la akvofluo kaj kontraŭ vento, palpante per unu mano kablون kaj tirante per la alia mano siajn samklasajn fratojn. Tiu trapasejo havas 800 ŝtupojn. Ili tre malfortiĝis kaj estis turmentataj de malsatego, ili devis fari grandan fortostreĉon por surpaŝi ĉiun ŝtupon. Dank' al la firma volo kaj solidareco, ili fine atingis la okan galerion. Tio pliiĝis ilian esperon pri elsaviĝo.

Tiutempe, ili jam havis neniom da forto por plu iri kaj restis en mineja ĉaro. Pro malvarmo ili kunpremiĝis kaj de tempo al tempo trinkis akvon por iom moderigi sian malsaton.

Neniu el ili sciis, kiom da tempo pasis. Iufoje, Vang Ŝuli subite kriis ĝoje: "Jen, lumo!"

Ili pene sin levis kaj vidis, ke flagras lumo en malproksimo. Ili tre ĝojiĝis kaj kriis unuvoĉe. Sed la krio tro malforta dronis en la bruado de la fluanta akvo en la galerio, la serĉantoj ne aŭdis ĝin kaj la lumo malaperis.

Longe rigardante la direkton, kie aperis la lumo, Ĉen Ŝuhaj diris al siaj kolegoj: "La lumo certe devenis de homoj alsenditaj de la gvidantoj por serĉi nin, ili certe venos refoje, la gvidantoj kaj kamaradoj ne forgesos nin." La lumo donis al ili esperon kaj fidon. Ili komencis deĵori alterne por atendi reaperon de la lumo.

Pasis ĉ. unu tago, Vang Ŝuli refoje la unua kriis: "Lumo venis, lumo venis!" Ili kvinope kriis tutforte kaj samtempe frapadis la ĉaron. La serĉantoj fine aŭdis ilin. Kiam ili trovis, ke



*Ĉen Ŝuhaj (la unua dekstre) kaj liaj kolegoj*

la lastaj ankoraŭ vivas, ili emocie ĉirkaŭpremis unu alian. Tiam jam estis la 12-a horo de la 11-a de aŭgusto, t. e. 15 diurnojn post la tertremo!

“Ĉen Ŝuhaj kaj liaj kolegoj ankoraŭ vivas!” La informo rapide traflugis diversajn lokojn. Ĝaŭgeĝuang-karbominejo ekbolis de tio.

Hoŭ Ĝanjoŭ, vicestro de la revolucia komitato de tiu minejo tuj eniris la ŝakton kune kun kuracistoj kaj flegistoj por fari al ili urĝan savon.

Ankaŭ la supera instanco baldaŭ faris instrukcion: “Bone protektu la kvin kamaradojn kaj elportu ilin vivantaj!” “Atente protektu iliajn okulojn, absolute ne permesu ian ajn difekton al ili!”

En la ŝakto, spertoriĉaj kuracistoj faris urĝan savadon, surtere oni starigis provizoran tendon kaj faris ĉian preparon por kuraco. La kvin ministoj estis ekstreme malfortaj, oni portis ilin el la ŝakto per brankardoj nur post ioma boniĝo de ilia sanstato dank’ al atentaj savado kaj flegado.


La 22-a de aŭgusto estas ne forgesebla por la laboristoj de Kajluan. Tiutage Prezidanto Maŭ en malsano pridemandis la faron de la kvin ministoj kaj instrukciis, ke Ĉefministro Hua

Guofeng sendu venigi ilin al Pekino por plua kuracado.

Rakontante pri tio, Majstro Ĉen emociiĝis ĝis larmoj. Li diris: “En la malnova socio, la ministoj, kiel ni, estis nomataj de riĉuloj ‘minejaj almozuloj’. En ŝaktoj ĉiutage mortis ministoj, sed neniu zorgis pri tio. Iufoje pli ol 400 ministoj mortis de gaseksplodo, kaj pli multaj homoj mortis de frosto kaj malsato. La pasinteco tiel diferencas de la nuno kiel la infero de la paradizo!”

Post resaniĝo Majstro Ĉen revenis de Pekino al Kajluan kaj tuj petis permeson enŝaktiĝi por laboro. Ĉen Ŝuhaj jam estas 56-jara. Laŭ la leĝo li povas emeritiĝi, sed li persiste laboras en ŝakto por produkti karbon por la ŝtato kaj instrui sian multjaran sperton al la juna generacio.

Jurnaloj raportis ke la karba produktokvanto de Ĝaŭgeĝuang estas ĉiam relative alta, kaj mi petis Majstron Ĉen iom paroli pri tio. Li diris: “Sub la Karbomineja Administracio de Kajluan estas sep karbominejoj, el kiuj Ĝaŭgeĝuang kaj Linhi estas la plej grandaj, kaj ankaŭ ilia produktokvanto estas la plej granda. En la tertremo de 1976 la minejoj suferis grandan perdon. Sed



de HUA JUAN

**S**UR la okcidenta altebenajo de nia lando laboras la Poŝtista Grupo de Ali. Ĝia tasko estas transporti poŝtaĵojn tra la vojo inter Kaŝ de Hingiang kaj Ali de Tibeto kun longeco de pli ol 1,400 kilometroj. En la lastaj dekkelkaj jaroj, tiu grupo lernadis modelajn agojn de laboristoj de Daking-olekampo, sekure veturis 1,200,000 kilometrojn trans glaciaj montoj kaj torentoj kaj tra gobio kaj ravinoj, transportis 1,140 tunojn da poŝtaĵoj, gazetoj kaj ĵurnaloj.

La Poŝtista Grupo de Ali estas fondita en 1958 kaj ĝiaj membroj devenas de la naciecoj ujgura, huja kaj hana. Antaŭ 1958, la poŝtaĵoj senditaj al Ali estis transportitaj per kameloj kaj tio bezonis duonjaron. En 1958, la Hingiang-Tibeta Ŝoseo malfermiĝis al trafiko kaj ankaŭ poŝtaj aŭtoj povis atingi Ali. Sed pro tio ke la vojo transpasas montojn de Karakorumo kun alteco de 4,000 ĝis 6,000 metroj super la mara nivelo, kaj furiozas neĝoŝtormoj en vintro kaj printempo, estis tre malfacile veturi tie en la periodo de novembro ĝis marto de la sekvanta jaro. En la Granda Proleta Kultura Revolucio,

post restarigo de la produktado, la laboristoj decidis ŝtopi la perdon kaj en 1977 ni jam levos la produktokvanton ĝis la nivelo antaŭ la tertremo.

Li parolis al mi pri la grupo de labormodelo Ĉu Ginghiu.

La 20-jara Ĉu Ginghiu gvidas karbofosan grupon de 9 laboristoj. En Ĝaŭgeĝuang-karbo-minejo tiu grupo la unua elmetis la sloganon "klopodi por kompensi la perdon kaŭzitan de la tertremo". Ili faris detalan kalkulon: En 1976, 85 tagojn la grupo ne povis labori en ŝakto, kaj

la diversnaciecaj membroj de la Poŝtista Grupo de Ali decidis venki la malfacilon kaj forigi la baron de la transportado de poŝtaĵoj.

En la komenco de januaro de 1971, la aŭto de tiu grupo plensarĝita per gazetoj, ĵurnaloj kaj poŝtaĵoj ekveturis al tiu "malfacila loko" unuafoje en frosta sezono.

La Hingiang-Tibeta Ŝoseo serpentas tra la montaro Karakorumo jen supren jen malsupren kaj multaj gigantaj glaciejoj kuŝas sur ĝi. Foje kiam la poŝta aŭto trapasis glaciejon, ĝi renkontis neĝoŝtormon. Furioza ventego atakadis la aŭton per levitaj neĝo kaj glacio. La ŝoforoj ne povis klare vidi la vojon kaj la aŭto estis minacata de danĝero fali en neĝon kaj glacieron. La ŝoforoj Gaŭ Ĵenjuan kaj Song Banghua kaj la eskortisto Ĝang Jongki saltis de la aŭto kaj klopodis por forŝoveli neĝtavolon ĝistalie profundan sur la vojo, kaj la aŭto povis iri antaŭen nur malrapide. La ŝovelado sur la altebenajo kun maldensa aero kaj frostado de pli ol 40 gradoj sub nulo estis malfacilega kaj ili devis spiregadi post 2 aŭ 3 ekŝoveloj. Ili atingis la etapon post

tio kaŭzis, kalkulite laŭ la produkta nivelo antaŭ la tertremo, perdon de 10,200 tunoj da karbo. Ili decidis kompensi tiun perdon per sia klopodo. Tio postulis ke ĉiu grupano ĉiutage produktu je 3.1 tunoj pli multe, post plenumo de la difinita tasko en 1977. Ili ĉiutage iris al laboro frue kaj foriris malfrue, kaj senĉese plibonigis la produktan teknikon. Ĉe la fino de majo de la lasta jaro ili jam kompensis la perdon de 10,200 tunoj da karbo.

Post tiu sukceso la grupo de Ĉu Ginghiu ne fieriĝis. Surbaze de la akirita sperto, ili



15-hora luktado kun la neĝostormo. En la sekvanta tago, ankoraŭ hurladis ventego kaj neĝadis. Vizaĝe al la malfaciloj ili pensis, ke ilia prova veturo koncernas al la efektivigo de poŝto-transportado inter Kaŝ kaj Ali dum la tuta jaro kaj ili nepre devas tion sukcesigi malgraŭ ĉia ajn malfacilego. Kaj ili senŝanceliĝe veturis antaŭen en neĝostormo. Subite aŭdiĝis bruego, okazis lavango. Gigantaj glaciaj blokoj kaj ŝtonetoj ruliĝis malsupren kaj obstrukcis la vojon. Ili forigis la falajon, liberigis la vojon, daŭrigis sian veturadon kaj fine atingis Ali. Ili akiris sperton de transpaso de Karakorumo en vintro.

Somere degelas neĝo sur Kunlun-montaro, la riveroj abrupte ŝveliĝas, en valoj rapidas torentoj kaj malaltaj terenoj fariĝas lagoj. La ŝoseo ofte estas rompita de torentoj aŭ subite aperintaj lagoj. Tial ankaŭ en somero ne estas facile veturi tra tiu vojo.

En iu somero, ŝoforo Saj Baŭjun kaj eskortisto Gi Hiangkjun ricevis taskon transporti gravajn poŝtajojn. Konsiderante ke la monttorentoj ŝveliĝas posttagmeze kaj malkreskas post nokto-mezo, ili klopodis por multe veturi en la horoj kiam la monttorentoj malkreskas. Post kelkdiurna veturado ili venis al bordo de Duomarivero. Tie estis valo ĉirkaŭata de montoj, de kiuj muĝantaj torentoj fluis kun kotaj ondoj en la riveron. Ili haltigis sian aŭton apud la rivero kaj atendis malkreskon de la riverfluo. Kvantkam estis somero, tamen nokte estis tre malvarme en la ravino. Ili kolektis velkajn herbojn kaj faris fajron por sin varmigi. En frua mateno de

daŭre klopodis kaj ĝis la fino de oktobro la grupo produktis 12,820 tunojn da karbo pli multe, t. e. meznombro 1,425 tunojn por ĉiu grupano.

En Ĝaŭgeĝuang-karbonejo, tiaj grupoj, kiel tiu de Ĉu Ginghiu, ne estas malmultaj. Post restarigo de la produktado, tiu karbonejo levis ardan socialisman laborkonkurson por kompensi la perdojn kaŭzitajn de la tertremo. De januaro ĝis oktobro de 1977, ĝi produktis 1,689,580 tunojn da karbo.

la sekvanta tago, apenaŭ malŝveliĝis la fluo, ili tuj daŭrigis sian veturadon. Por ke la aŭto ne falu en kavon, Gi Hiangkjun sondadis per ligna bastono antaŭ la aŭto. Fine ili sekure atingis la cellokon.

En 1976, ili transportis 38-foje, t.e. 9-foje pli multe ol en 1975, sekure veturis 136,000 kilometrojn, t. e. je 36,700 kilometroj pli multe ol en 1975. Tiujare ili transportis 114 tunojn da gazetoj, ĵurnaloj kaj poŝtajoj, t. e. je 40 tunoj pli multe ol en 1975. En tiu jaro, ĉiuj membroj de la grupo plenumis siajn deĵorojn kaj helpis alian grupon transporti 16 tunojn da poŝtajoj.

Post la frakaso de la "kvarpersona bando", pli energie laboras la Poŝtista Grupo de Ali. En aprilo de 1977, post kiam eldoniĝis la 5-a volumo de la "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong", la supera instanco donis al tiu grupo la taskon transporti la verkon de Prezidanto Maŭ al Ali. En aprilo, ĉe iuj lokoj en Kunlun-montaro neĝis, ĉe aliaj lokoj neĝo degelis en tagmeza sunbrilo kaj moliĝis la vojpartoj ĉe sunumata montpiedo, kio tre malfaciligis trapason de aŭtoj, precipe la peze ŝarĝitaj. Sed la ŝoforoj Ĉen Hiangĝong, Ĝang Faming kaj Gia Gianguo venkis multajn malfacilojn kaj je 2.5 tagoj antaŭdate transportis la librojn al Sikjuanhe, kie sidas la gvidaj organoj de la subregiono Ali.

Pro la laŭdinda multjara laborado de la Poŝtista Grupo de Ali, la supera poŝtoŝicejo donis al ĝi honoran flagon kun la surskribajo "Antaŭen en Venko".

En la sekvanta tago mi pririgardis enŝaktan laboron akompanate de Ĉen Ŝuhaj. Per mineja vagono ni venis al la kvara galerio, veturis tra koridoro kaj per alia vagono ni atingis la okan galerion je 800 metroj sub la tero. Mi rigardis la 800 ŝtupojn kaj la minejan vagonon, kiujn ili kvinope trapasis kaj uzis. Poste, ni venis al karbofosa grupo. La elfosita karbo senĉese fluas malsupren sur skrapĉena transportilo.

Finiĝis mia vizito, mi forte premis al Majstro Ĉen la manon por esprimi al li mian estimon kaj dankon.

# Serĉi klasfratojn en Gobio

**F**RUMATENE de la 19-a de aŭgusto, 1977, iu aerarmeas trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en Hingiang ricevis ordonon de la supera organo: "Via trupo tuj sendu aviadilon al Ŝanŝan-regiono por serĉi en Gobio 28 geologiajn laborantojn, kiuj perdis la vojon antaŭ du tagoj."

La tasko estis tuj donita al la grupo de Suo Hanguj. Post streĉa preparo eskadrestro Suo Hanguj, ĉefpiloto Giang Ĉangĉun kaj piloto Jang Ŝigin tuj veturis al la aerodromo. Por kiel eble plej frue trovi la perditajn personojn, la ekspedejo konsentis la peton de la grupo ekflugi je 10 minutoj antaŭ la difinita tempo.

La 28 geologiaj laborantoj estis membroj de la Unua Taĉmento de la Naŭa Geologia Brigado de Junnan partoprenanta en prospektado en Hingiang. Inter ili estis 7 virinoj. Antaŭtagmeze de la 17-a de aŭgusto, kiam ili iris de la kampadejo de la Dua Taĉmento al tiu de la Unua, ili perdis la orientiĝon en Ŝanŝan. Ili veturis per aŭto 11 horojn en la vasta Gobio, tamen ili ne sukcesis trovi vojon, ĝis kiam elĉerpiĝis la benzino de la aŭto. Kunportante nek nutraĵojn nek akvon ili izoliĝis senhelpe en la vastega Suda Gobio de Ŝanŝan, kie troviĝis eĉ neniu herbo.

La Dua Taĉmento distancis de la Unua Taĉmento nur iom pli ol 100 kilometrojn. En tiu vespero kamaradoj de la Unua Taĉmento tre maltrankviliĝis pro tio, ke la 28 kolegoj ankoraŭ ne revenis en malfrua horo. Ili raportis tion al la geologia brigado. La brigado tuj kunvokis urĝan kunvenon kaj decidis, ke ĉiuj gvidantoj iru serĉi kun aliaj kamaradoj la perditajn, kaj instrukiis ke ankaŭ la taĉmentoj sendu siajn homojn por serĉi ilin. Dekkelkaj aŭtoj ekveturis al Gobio kun areo de centoj da kilometroj.

Pasis la nokto de la 17-a kaj ankaŭ la tago 18-a, sed ili ankoraŭ ne trovis la perditajn personojn. Por rapide elsavi la 28 geologiajn laborantojn el danĝero, la brigado sin turnis al la popola aerarmeo por peti helpon.

La aviadistoj detale studis la geologian mapon liveritan de la geologia brigado kaj la aviadma-

pon kaj tuj difinis la linion de serĉado. Ili diris, ke ili estas popolaj armeanoj kaj nepre venkos la malfacilojn por elsavi la kamaradojn. En la senlima sablomaro de Gobio la montoj staras kvazaŭ rifoj. Serĉante ilia helikoptero malalte flugadis tien kaj reen kiel pluganta traktoro. La suno super la somera Gobio ardegis kiel fajro, kaj la aviadila kajuto fariĝis varmega. La temperaturo en ĝi superis 40° C kaj ĉiuj en ĝi ŝvitegis. Pro la abrupta variado de la aerofluro super Gobio la aviadilo jen leviĝis jen malleviĝis kiel boato sur ondegoj. Kun streĉa atento ĉefpiloto Giang Ĉangĉun tenadis la aviadilon en alteco de 200 ĝis 300 metroj, kaj la aliaj kamaradoj rigardadis malsupren per larĝe malfermitaj okuloj.

Tiutempe la 28 geologiaj laborantoj estis ĝuste en valo ĉirkaŭita de montoj en tri flankoj. Perdinte la vojon la viciaĉmentestro Peng Guobin tre maltrankviliĝis. Li konseie, ke li, kiel kompartiano, devas bone organizi ĉiujn kamaradojn por venki la malfacilojn. Post interkonsiliĝo kun alia kompartiano, ŝoforo Ĝang Giking, li tuj fondis provizoran partian grupon kaj provizoran filion de la Komunisma Junulara Ligo, kaj decidis, ke la nura rezervo de la duonkruĉo da akvo kaj la akvo en la radiatoro de la aŭto estu uzita nur en plej malfacila momento. Kun solidareco, ili pasigis la unuan nokton en malsato. En la sekvanta tago, la varmega suno bakadis la geologiajn laborantojn. Nenion manĝinte kaj neniom trinkinte en tuta diurno, ili sentis kapturiniĝon pro malsato kaj soifego. Peng Guobin svenis plurfoje. Kamaradoj donis al li duontason da akvo prenita el la radiatoro. Sed li rifuzis dirante ke tio devas esti rezervita por aliaj kamaradoj. Malgraŭ la turmentado de soifo kaj malsato li rakontis al la gekamaradoj herajaĵojn de la Ruĝa Armeo en la Longa Marŝo kaj tiujn de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj, kiuj persistis en batalo ĉe Ŝangganling en la Kontraŭusona Milito por Helpi Koreion, per kio li kuraĝigis ilin venki malfacilojn.

Posttagmeze de la 18-a pli kaj pli multiĝis svenintoj pro malsato, soifo kaj varmeĝo. La partia grupo decidis, ke la sekretario de la Komunisma Junulara Ligo Ĝaŭ Hingtian kaj aliaj relative fortaj kamaradoj prizorgu la malfortajn. Kun alta devokonscio Peng Guobin skribis raporton pri la vojperdiĝo. Apenaŭ membro de la Komunisma Junulara Ligo Sun Lian-gju vekigis de sveno, li kun granda malfacilo portis la mezurilojn en la aŭto al sekura loko. Ĉiuj kamaradoj firme kredis, ke la supera partia organizo certe serĉos ilin. Iuj kamaradoj suriris monteton kaj starigis tie ruĝan flagon kiel signalon por atentigi alvenontajn kamaradojn.

La helikoptero daŭre rondflugis super Gobio. Tagmeze, kiam la aviadilo flugis trans monteton, la piloto subite ekkriis ĝoje: "Jen tie estas aŭto!" Suo Hanguj tuj ordonis mallevi la aviadilon. Ili ekvidis la ruĝan flagon sur la montopinto, kaj ankoraŭ iom malleviginte, ili vidis la homojn en la valo. Ankaŭ la geologiaj laborantoj rimarkis la aviadilon. Iuj el ili svingis malgrandan ruĝan flagon kaj aliaj siajn manojn. Suo Hanguj sekure surterigis la aviadilon kaj ĉiuj membroj de lia grupo tuj saltis el ĝi kaj donis akvon kaj manĝaĵojn al la gekamaradoj malfeliĉaj. Nemalmultaj el ili ĉirkaŭprenis la ĈPLA-anojn per tremantaj manoj kaj diris emocie: "Dankon al vi!" Suo Hanguj diris kun larmoj: "Ni devas danki al la Partio kaj Prezidanto Hua!"

Malgraŭ lacego ili flugis tri fojojn ir-reire kaj portis la 28 geologiajn laborantojn en la hospita-



Pentrita de DONG ĜENSENG

lon de la trupo. Dank' al urĝa savado de medicinaj laborantoj ĉiuj svenintaj kamaradoj baldaŭ resaniĝis.

La novaĵo pri savado de la 28 geologiaj laborantoj rapide atingis la prospektorajn punktojn de Gobio kaj ankaŭ venis al la ĉefurbo Pekino. La Ŝtata Geologia Buroo, la Hingiang-a Geologia Buroo kaj la Partia Komitato kaj laboristoj kaj oficistoj de la 9-a Geologia Brigado de Junnan ĉiuj sendis telegramojn al la aerarmea trupo en Hingiang por kore danki la popolajn armeanojn.



### ĈINIO KONSTRUIS SURTERAN STACION DE CIFERA SPUTNIKA KOMUNIKO

La unua surtera stacio de cifera sputnika komuniko projektita kaj konstruita de nia lando estas ekfunkciigita kun sukcesaj rezultoj. La dukanalaj koloraj televidaj programeroj ricevitaj per ĝi estas klaraj kaj la sonflekto estas tre bona.


La stacio estos uzata por transsendo de la "Popola Ĵurnalo", radio- kaj televido-programoj kaj aliaj radiaj komunikaĵoj de Pekino al malproksimaj lokoj de nia lando. La

sukcesa konstruo de tiu stacio havas gravan signifon por disvolvi la ĉinan oceanan komunikadon, akceli la modernigon de nia telekomuniko, disvolvi nian nacian ekonomion kaj astronautikon kaj fortigi la nacian defendon de nia lando.



*Anteno de la surtera stacio de cifera sputnika komuniko*

*La direkta centralo de la nomita stacio*



### FRIDIGO DE BUBALA SPERMO

La tekniko de fridigo de bubala spermo jam estas sukcese mastrata de ĉinaj sciencaj laborantoj kaj tio pretigis favoran kondiĉon por vasta praktiko de arta fekundigo de bubalinoj kaj rapida plibonigo kaj plimultigo de bubaloj en suda Ĉinio.

Freŝa bubala spermo uzata en arta fekundigo povas esti konservata nur en maksimume 7 tagoj, dum fridigita spermo povas konserviĝi en pli ol dek jaroj. Dank' al apliko de la nova tekniko, la spermo de ĉiu bubalo sufiĉas por gravedigi 12,000 bubalinojn, t. e. ĉ. 10-oble pli multe ol apliko de konservado je ordinara temperaturo. Pli ol 40% de la spermatozooj en fridigita spermo restas vivipovaj, preskaŭ same multe kiel tiuj de freŝa bubala spermo. Prova uzo de fridigita spermo al pli ol 10,000 bubalinoj en provincoj en suda Ĉinio sukcesis gravedigi ĉ. 50% de ili. La sciencaj laborantoj ne nur sukcesis en fridigo de bubala spermo entenata en maldikaj tuboj, sed ankaŭ eltrovis simplan teknologian procedon por fridigo de bubala spermo taŭgan por uzado en kamparo.



# Tajŝan — hejmloko de ĉinaj elmigrintoj




Nova fizionomio de vilaĝo


La gubernio Tajŝan situas sur la Delto de la Perla Rivero, apud la Suda Ĉina Maro. En ĝia nordo ondiga montetaro kaj en la sudo etendiga ebenaĵo. Kaj en la gubernio sin trovas insuloj kaj altaj montoj. La loko estas vere bela kaj riĉa.

Sed, antaŭ pli ol 100 jaroj, pro la oftaj katastrofoj de sekeco kaj inundo, la tiea popolo vivis tre mizere kaj multaj el ili devis migri alilanden por serĉi vivrimedon. Ĝis la Liberiĝo pli ol 100 miloj da homoj de la gubernio elmigris en pli ol 60 landojn de la mondo kaj plejparto el ili nun loĝas en Ameriko. Tial Tajŝan havas alian nomon “Hejmloko de Ĉinaj Elmigrintoj en Ameriko”.

La nuna Tajŝan estas tute malsama al la antaŭa. En la gubernio oni konstruis pli ol 530 grandajn, mezajn kaj malgrandajn akvokonservejojn, multajn elektrajn pumpejojn kaj irigaciajn kanalojn. Dank’ al tio la pli ol 53,000 hektaroj da kampoj povas doni bonan rikolton malgraŭ sekeco kaj inundo. Antaŭ la Liberiĝo Tajŝan povis produkti nur duonon de sia bezonata greno, kaj nun jam tute ŝanĝiĝis la stato.

La gubernio nun havas industriojn de karbo, elektro, kemisterko, insekticido, agrikulturaj maŝinoj, cemento, ŝipkonstruado, tekstilaĵoj, vinfaro, prilaboro de greno kaj oleo k. a. Progresas ankaŭ ĝiaj kulturo, eduko, higieno, sporto kaj urba konstruado.





Arta lago en Tajšan



Kampoĵ



Forŝtoj



## FISAJ FOSILIOJ

Geografia instruisto de iu alta lernejo malkovris, sub helpo de geologiaj laborantoj kaj kamparanoj, fiŝajn fosiliojn en Guangdong-provinco de suda Ĉinio. Post ekspertizo oni kredas, ke ili estas fosilioj de antikvaj dolĉakvaj fiŝoj vivintaj antaŭ 50 aŭ 60 milionoj da jaroj.

La korpo de fiŝoj estas malgranda kaj iliaj ostoj estas ne solidaj, tial estas malfacile formiĝi fosilio de kompleta fiŝo, kaj fiŝaj fosilioj estas relative raraj. La eltrovaĵoj ne nur estas riĉaj materialoj por studo pri la origino kaj evoluo de dolĉakvaj fiŝoj, sed ankaŭ novaj konkretaj atestaĵoj por difini geologian tempon kaj studi pri kondiĉoj por estiĝo de iuj mineraloj.

La fosiliaj fiŝoj estas malgrandaj, ilia longeco estas malpli ol 10 centimetroj. Ili ĉiuj estis dolĉakvaj fiŝoj de 12 genroj kaj 8 familioj kaj 8 el ili estas novaj specioj antaŭe nemalkovritaj. 75% el la fosiliaj fiŝoj apartenas al la familio de karpoj. Tio montras, ke la historio de la ĉinaj karpoj estas tre longa.

## TOMBO DE LA OKCIDENTA HAN-DINASTIO

En la Guanghi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono, oni trovis antaŭ nelonge grandan lignoĉerkan tombon de la frua periodo de la Okcidenta Han-dinastio. La granda kvanto da objektoj trovitaj en tiu tombo estas gravaj materialoj por studi la antikvan kulturon de tiu regiono.

Tiu tombo estis antaŭe priŝtelita, tamen restis en ĝi ankoraŭ pli ol mil objektoj inkluzive de bronzaĵoj, feraĵoj, lakitaj lignaĵoj, fajencaĵoj, jadaĵoj, teksaĵoj kaj semoj. En la tombo troviĝis ligna akto kun pli

ol 300 ĉinaj ideogramoj, kiu registris la entombigitajn objektojn. La formoj de plejparto de la objektoj estas similaj al tiuj trovitaj en la basenoj de la Flava Rivero kaj Jangzi-rivero, kaj laŭ la surskribaĵoj de iuj objektoj oni povas konstati, ke iuj el ili venis de norda Ĉinio. Tio montras, ke post kiam Kin-dinastio unuigis Ĉinion, la kulturo de tiu regiono pliapaŭse kunfandiĝis kun tiu de centra Ĉinio.

## VEJĈI-KONKURSO

Ĉinaj eminentaj vejĉiistoj faris, antaŭ nelonge en Pekino, prezentan konkurson. Fang Ji, membro de la Politika Buroo de CK de KPC kaj honora prezidanto de la Ĉina Vejĉia Ligo, Vang Meng, estro de la Ŝtata Sporta Komisiono, kaj pli

ol mil vejĉiaj ŝatantoj rigardis la ludadon.

La konkursantoj estis juna Nie Vejping, kiu gajnis la ĉampionecon en la ĉina tutlanda vejĉi-konkurso de la pasinta jaro, kaj ĉina veterana vejĉiisto Vu Songŝeng.

Vejĉio estas unu el la plej ŝatataj sportoj de nia popolo. La forpasinta Vicĉefministro Ĉen Ji iam estis la honora prezidanto de la Ĉina Vejĉia Ligo. Dank' al lia persona direktado, rapide altiĝis la nivelo de nia vejĉia sporto.

En la lasta konkurso, ambaŭ ludantoj montris sian apartan stilon kaj sagacon, kaj la originalaj paŝoj, rapida dispozicio kaj intensa mezmatĉa lukto profunde impresis la rigardantojn.



*Nie Vejping kaj Vu Songŝeng en vejĉi-konkurso*

# Notoj pri ekspozicio de ludiloj

de VAN JING

**L**UDILOJ interesas ne nur la infanojn sed ankaŭ plenaĝulojn, kaj mi estas unu el la lastaj. Lastjare okazis ludila ekspozicio en la Belarta Ekspoziciejo de Pekino kaj mi ĝin vizitis. Tie mi vidis jubilentajn amasojn de infanoj kaj geknaboj.


Laŭtaj krioj "Rapidu, Rapidu!" tiris min al la stando de "Sporta Kunveno de Infanoj", kie ludis multaj pupoj. Iuj el la vivecaj pupoj en helkoloraj sportistaj kostumoj skiis, aliaj sketis,



*Silkbuboj ekdancas.*

triaj ŝnurtiradis, kvaraj konkure biciklis kaj kvinaj ludis tablotenison. Ili moviĝis aŭtomate kaj kontinue. La sketantoj povis fari artan sketadon, kaj la skiantoj glite descendis altan montodeklivon je palpebrumo. La malgrandaj rigardantoj ridis kaj saltadis pro la amuza spektaklo.

En la ekspozicio troviĝis ankaŭ ludiloj por pedagogio kaj scienca eduko al infanoj antaŭ lernaĝo kiel ekzemple grandaj lulbestoj kaj tobo-



gano, kaj ankaŭ mezaj kaj malgrandaj ludiloj kiel ludbrikoj, puzzlekuboj, ĵetringoj kaj bildoj por vortokonado. La ludiloj por scienca eduko, kiel ekz. aviadaj ludiloj, aviadilaj modeloj, ludiloj regataj per radio aŭ sono, taŭgas por instrui geknabojn pri sciencoj.

Mi rigardis prezentadon de pupoj direktataj per sono. Je fajfo de la manipulanto la pupoj tuj turnis la kapon kaj palpebrumante rampis antaŭen. Ili moviĝis kvazaŭ veraj beboj. Tie montriĝis ankaŭ ludiloj regataj per radio, lumo kaj magneto, ekz. telestirata tanko, fotoelektra ŝipo, sketaj pupoj regataj per magneto, trajno povanta aŭtomate turniĝi kaj fajfi kaj urseto povanta ŝprucigi akvon.

Amaso da infanoj svarmis ĉirkaŭ vitrino por rigardi interesajn ludilojn. Kun ĝojo en la okuloj ili montradis kaj nombradis. Tie montriĝis ludiloj el plasto, argilo, pluŝo, ligno, herbo kaj bambuo, en diversaj formoj kaj originalaj gustoj. Tre allogaj estis la pluŝaj ludiloj de dekoj da specoj kiel leono, tigo, urso, pando, ĝirafoj kaj elefanto. Krome troviĝis ankaŭ ludiloj kun aparta nacia stilo kaj lokaj koloroj, kiel ekzemple famaj argilaj ludiloj de Vuhi de Giansu, broditaj ludiloj de Ŝantoŭ de Guangdong, ceramikaj ludiloj de Ŝivan de Guangdong kaj plektitaj ludiloj el herbo de Ŝandong-provinco. Iuj el la popolaj ludiloj belaj en formo kaj koloroj eĉ taŭgas por ornamo salonon kaj dormoĉambron.

Tie troviĝis ankaŭ mezgranda bela ksilofono, kiu estis nova produktajo de la Kvina Ludila Fabriko de Pekino. La ŝlosila procedo en produkto de ksilofono

noj estas korektado de iliaj tonoj. Tiun laboron plenumas laboristino malgranda Ĝu kun aĝo de 20 jaroj. Dank' al diligenta lernado ŝi sukcese plenumis la taskon.

La ekspoziciitaj 631- kaj 641-tipaj ludilpistoloj estas tre ŝatataj de infanoj. Tia pistolo povas enteni 5-8 kuglojn kaj estas malmultekosta. Tial, ĝi vendiĝas tre rapide, kaj laboristoj klopodas por multe produkti tian pistolon kaj levi ĝian kvaliton. Ili konkuras en laboro kaj senĉese starigis novajn rekordojn, tiel ili plenumis la bezonon en la merkato.

*Etaj spektatoroj*



# Kanto de la juneca

(Elektitaj ĉapitroj de la romano)



## Antaŭparolo de la aŭtoro

“Kanto de la Juneco” estas mia unua romano finskribita en 1957 kaj denove eldonita post revizio en 1959. Okaze de la aperigo de esperantigitaj elektitaj ĉapitroj de la romano en EPĈ, ĝia redakcio deziras, ke mi skribu kelkajn vortojn pri ĝi. De kie mi komencu?

Kiam mi finskribis la libron post nekontinua verkado en 6 jaroj, mi vere sentis min kvazaŭ liberigita de peza ŝarĝo. Mi pensas, ke multaj homoj certe havas tian senton: Ĉu estas io alia ol finplenumo de malfacila tasko komisiita de la popolo, kiu povas doni tiel grandan ĝojon? Por mi, komencanto de verkado, skribi tiun romanon estas ja peniga laboro. Mi estas tre malriĉa je batala sperto kaj arta esprimpovo, kaj krome mi longtempe suferis malsanojn kaj sentis, de tempo al tempo, elĉerpigon de energio. Sed kial mi persistis en la verkado super mia kapablo? Kiaj fortoj instigis min 6-7-foje reskribi kaj revizii la verkon kaj helpis min pasigi malfacile la longajn tagojn? Parolante pri tio, mi nun ankoraŭ ne povas min deteni de emociiĝo . . . Mi sincere diru al miaj legantoj:

Tio okazis jam antaŭ 50 jaroj.

Kiam mi lernis en elementa lernejo, iun nokton al mia hejmo venis juna studento. Li estis mia samlokano de Hunan kaj iam vizitis mian familion, tial mi konis lin. Tiunokte li babilis

kun miaj gepatroj en la ekstera ĉambro. Ni infanoj frue enlitigis. Kiam mi vekigis el la dormo en la interna ĉambro, mi trovis, ke la studento ankoraŭ ne foriris kaj daŭre babilis kun miaj gepatroj. Mi sentis en tio iom da strangeco: “Kial li ankoraŭ ne foriris en tiel malfrua horo? . . .” Tiam neniu el nia familio sciis, ke li venis al nia hejmo de burokrato-bienulo por rifuĝi. Fine li foriris, eble pro tio ke miaj gepatroj ne petis lin tranokti ĉe ni. Post du tagoj lia nomo aperis en la ĵurnalo Ŝuntian Ŝibao de Pekino — li estis arestita. Post kelkaj tagoj mi denove trovis lian nomon en la ĵurnalo — li kune kun Li Daĝaŭ\* kaj aliaj sume 20 kamaradoj estis pendigitaj de militaristo Ĝang Zuolin.

Kiel forte la informo skuis mian infanan koron! Tiam mi tre miris: Kial oni pendigis lin? Li ne estis rabisto, nek malbonulo, male li estis klera, kaj ankaŭ sincera, fervora kaj modesta. Ĉiufoje, kiam li venis al nia hejmo, li ĉiam prenis miajn manetojn kaj kun rideto diris al mi tion kaj ĉi tion. Eĉ hodiaŭ lia milda rideto ankoraŭ aperas antaŭ miaj okuloj . . . Sed li estis pendigita! Tiun enigmon de mia infaneco mi solvis nur kiam mi plenkreskiĝis: Ĉar li estis komunisto!

Tiel, la nobla figuro de la komunisto gravurigis en mia menso en la infaneco. En 1933, mi havis ŝancon kontakti revoluciajn gejunulojn kaj komunistojn en Pekino regata de se-

rioza blanka teroro, kaj dank' al ilia eduko, inspiro kaj kulturo mi amis pli forte la Komunistan Partion kaj komunistojn. Same kiel la pendigita studento, ili brave batalis en la blanka teroro por la aferoj de la popolo, tute ne timante vivoferon.

En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmito mi venis al la postfronta kontraŭjapana bazloko de centra Hebej-provinco. Tie mi kontaktiĝis kun pli multaj komunistoj kaj revoluciaj amasoj. Sub la oftaj "balaadoj" de la japanaj agresantoj kaj en tre kruelaj cirkonstancoj nemalmultaj el miaj bone konataj kaj intimaj kunbatalantoj brave martiriĝis.

La tagoj, kiujn mi pasigis kune kun tiuj martiriĝintaj kunbatalantoj, estis tagoj, en kiuj mi estis edukita kaj kortuŝita kaj iom post iom forlasis miajn multajn nesanajn sentimentojn de etburĝa intelektulo. Per siaj kortuŝaj aferoj tiuj kamaradoj, kunbatalantoj kaj eminentaj komunistoj faris sur mi impreson pli profundan kaj pli klaran ol la pendigita studento. Tiam ili senĉese kuraĝigis min kaj instigis min lerni de tiaj kamaradoj, kiuj brave batalis kaj ne timis vivoferon. En paŭzo dum batalado ofte ĝermis en mia koro deziro priskribi iliajn heroaĵojn. Tamen tio estis tute nebla en la cirkonstancoj de la militado.

Post la Liberiĝo mi ekripozis pro malsano en la jaro 1950. Tiam miaj martiriĝintaj kunbatalantoj denove venis en mian koron kaj vekis en mi profundan karmemoron pri ili. Mi do ekprenis la plumon kaj komencis la verkadon de "Kanto de la Juneco".

La libro prenis kiel sian fonon la nacisavan movadon de pekinaj studentoj en la periodo de "La 18-a de Septembro" de 1931, kiam la japana imperiismo invadis nordorientan Ĉinion, ĝis "La 9-a de Decembro" de 1935, kaj kiel sian ĉefan linion la reformadon kaj kreskadon de Lin Daŭging. En ĝi mi emfaze priskribis la noblajn kvalitojn kaj heroajn figurojn de komunistoj Lu Giaĉuan, Lin Hong, Giang Hua k. a. Mi amas ilin, precipe Lu Giaĉuan. Kiam mi skribis la lastan leteron de Lu Giaĉuan al Lin Daŭging antaŭ lia martiriĝo, miaj larmoj gutadis de la vangoj kaj malsekigis la paperon.

Ĉia ajn verko ne povas apartiĝi de la vivo de la aŭtoro. Tio estas nedisigebla de mia persona travivaĵo ke mi povas krei la figuron de Lin Daŭging. Mi havis preskaŭ samajn travivaĵojn kaj iritan vojon kiel Lin Daŭging. En la malnova socio, kiam mi ne volontis fariĝi amuzilo de altranguloj kaj sklavino de familio kaj tutkore aspiris al sendependa vivo, min trafis serio da batoj: interrompiĝo de lernado, senlaboro kaj vagado. Eĉ mia laborposteno de instruistino en vilaĝa elementa lernejo kun malmulta salajro estis ne garantiita. Tiam mi trovis min en ĉagreno, necerteco kaj senelirejo kaj mi eĉ provis min mortigi pro indigno. Ĝuste tiam mi feliĉe renkontis la Kompartion kaj komunistojn. Ili edukis min kaj kondukis min sur la revolucionan vojon. De tiam mi turnis min, malgajan kaj pesimisman junulinon perdintan esperon pri la vivo, en revolucionan junulinon, kiu havas idealon, batalan celon kaj sopiras sin ĵeti al torento de la proleta revolucia afero. Kaj ankaŭ multe ŝanĝiĝis mia humoro: Mi fariĝis gaja, vigla kaj plena de sopiro al bela perspektivo . . . De tiam mi elsaltis el la malgranda rondo de individua strebado kaj grandpaŝe iris sur la revolucionan batalkampon malfacilan . . . Ĝuste tiuj travivaĵoj kaj dankemo al la Partio pro ĝia savo ebligis al mi krei la heroinon Lin Daŭging. Tra ŝiaj travivaĵoj mi priskribis, kiel ŝi, sub la eduko de la Partio, iom post iom forigis siajn mankojn de etburĝa intelektulo kaj fariĝis komunistino en la batala praktikado de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj.

La fina kialo, ke mi kuraĝis skribi la libron, estas tio, ke mi ŝatas literaturon kaj ankaŭ volas uzi ĝin kiel armilon por fari iom da aferoj utilaj al la popolo. Se la libro ebligos al la vastaj amasoj de junuloj koni, kiel la ĉinaj revoluciuloj vivis kaj batalis, kaj pensigos ilin, kiel oni devas pasigi sian junecon kaj kiel fari sin utilaj al la popolo kaj la patrolando, sed ne vane pasigi la vivon, . . . tio estas mia plej alta espero por tiu libro.

en antaŭurbo de Pekino  
novembro, 1977

\* Li Daĝaŭ (1889-1927), unu el la fondintoj de la Komunisto Partio de Ĉinio

**F** RUMATENE, sur la vasta kaj verda kam-  
 paro kuris orienten trajno laŭlonge de la  
 fervoja linio de Bejping\* al Ŝenjang. Densaj  
 plantaĵoj, brilaj riveretoj, flavaj terkabanoj, rekte  
 starantaj stangoj de telegrafo . . . fulme forra-  
 pidis preter la fenestroj de la vagonaro, ĉe kiuj  
 sin apogis la pasaĝeroj por ĝissate enspiri la fre-  
 ŝan aeron. Enuigitaj de la rigardado eksteren,  
 la pasaĝeroj malrapide deturnis la kapon; iuj  
 oscedis, aliaj serĉis interesaĵojn en la vagono. Ne  
 longe poste, la rigardoj estis altiritaj de mal-  
 granda pakajo, kiu konsistis el amaso da muzi-  
 kiloj, ĉirkaŭvolvita per blanka silka tuko. Ĉu ĝi  
 apartenis al iu muzikilvendisto? La pasaĝeroj  
 ekturnis sian atenton al la mastro de la pakajo.  
 Ne estis komercisto, sed ĉirkaŭ 18-jara studen-  
 tino, kiu gardis la muzikajn instrumentojn. Ŝi  
 portis blankan robon longan ĝis la genuoj, blan-  
 kajn ŝtrumpetojn kaj blankajn kaŭĉukŝuojn, kun  
 blanka naztuko en mano: ĉio blanka. Ŝi sidis  
 sola sur ligna kanapo ĉe angulo de la vagono kaj  
 najlis sian rigardon tra fenestro eksteren. Sur  
 ŝia paleta vizaĝo brilis paro da grandaj kaj nigraj  
 okuloj. Tiu ĉi simple vestita senakompana kaj  
 bela knabino tuj fariĝis centro de la atento de la  
 pasaĝeroj, precipe de la viroj, inter kiuj komen-  
 cis zumi flustroj. Sed ŝajnis, ke la studentino  
 nenion vidas, nenion perceptas; ŝi longe enpro-  
 fundiĝis en sensenta meditacio.

Ŝia nekutima mieno, ŝia eksterordinara beleco  
 kaj ŝia stranga aspekto kun tia pakajo kaŭzis  
 miron al la samvagonanoj. Iom post iom ŝi  
 fariĝis temo de la babiloj.

“Tiu fraŭlineto eble malsukcesis en amo?”  
 diris mallaŭte al sia kunulo studento vestita en  
 eŭropa vesto kaj portanta ledajn ŝuojn.

“La amaso da blovaj kaj kordaj instrumentoj  
 valoras almenaŭ dek ĝis dudek juanojn,” diris  
 dika komercisto, kiu alproksimiĝis al la studento  
 kaj grimacis per la okuloj, fiksita al la muzikiloj  
 kaj la studentino. “Kio estas tiu knabino? Ĉu  
 vagkantistino? . . . ”

La studento ĵetis al li malestiman rigardon kaj  
 nenion respondis; kaŝe ekrigardinte al la tute

blanka studentino, li daŭrigis la interparolon  
 kun sia kunulo.

Kiam la trajno atingis la stacion de Bejdajhe,  
 la studentino prenis siajn muzikinstrumentojn —  
 ŝian tutan pakajon — kaj elvagoniĝis. La pasa-  
 ĝeroj, kiuj restis en la vagono, akompanis ŝin per  
 miraj kaj bedaŭraj rigardoj, ĝis ŝi deiris de la  
 kajo.

La malgranda stacio de Bejdajhe estis soleca.  
 La momenta vigliĝo, kiun alportis la trajno, re-  
 fariĝis dezerta silento kun la malapero de la  
 blanka vaporstrio, ŝprucigita el la lokomotivo.

Portante la pakajon en la mano, la studentino  
 rigardis ĉirkaŭen ekster la kajo. Kiam ŝi trovis,  
 ke neniu konato ŝin atendas, ŝi dungis pakaj-  
 portiston kaj sin direktis kun li al la vilaĝo  
 Jangĝuang.

Survoje, ŝi iris same apatie. Kun kapo klinita,  
 ŝi sekvis la portiston, nenion dirante. Post voj-  
 kurbiĝo, kiam ili suriris altaĵon, subite aperis  
 antaŭ ili senlima maro, kiu kuŝis sub la blua  
 ĉielo trans la verda kamparo. La studentino hal-  
 tigrigis siajn malrapidemajn krurojn. Ŝi fiks-  
 is sian rigardon al la maro, tute surprizita. Ŝiaj  
 okuloj radiis de ĝoja ekscitiĝo. “Ho, ho!” ŝi  
 diris al si, kun piedoj ŝtoniĝintaj sur la tero. “Estas  
 la unua fojo, ke mi ĝin vidas. Kiel bela!” Ŝi  
 avidigis rigardis la kvietan maron, sur kiu petolis  
 ondetoj, kaj forgesis la vojiradon.

“Fraŭlino, iru! Kial vi haltas?” kriis la por-  
 tisto, kiu, ne rimarkinte la ŝanĝon de la senti-  
 mentoj de la studentino, jam malsupreniris al la  
 piedo de la monteto, kiam li ektrovis, ke lia  
 dungantino restas ankoraŭ supre.

Sed la knabino daŭre rigardadis senmove al la  
 maro, al boato kun blanka velo, kvazaŭ ŝi estus  
 nenion aŭdinta.

“He! Fraŭlino, kio okazas al vi?” kriis malpa-  
 cience la portisto al la altaĵo. Nun la studen-  
 tino ekvekiĝis. Ŝi viŝis al si la okulojn, senpense  
 ekridis kaj rapidpaŝe kuris malsupren.

Ili daŭrigis kune la vojiradon.

La portisto estis babilema mezaĝulo. Li komen-  
 cis pridemandi tiun ĉi iom strangan studentinon:

“Kion vi rigardis sur la monteto?”

“La maron. Kiel bela ĝi estas!” respondis la studentino, klinante la kapon flanken. “Kiel feliĉaj vi estas, ke vi loĝas en tiu ĉi ĉarma loko!”

“Feliĉaj? Se fiŝon ni ne kaptas, malsato nin atendas. Ni tamen ne trovas en tio ian ajn ĉarmecon. . .”

Poste la portisto demandis kun rideto: “Pardonu, por kio vi venas? Kial sola? Ĉu por somerumi?”

La studentino afable ridetis al la portisto, kaj respondis post longa paŭzo: “Mi ne estas tiel riĉa, ke mi povas somerumi ĉi tie. Mi venas por viziti mian kuzon.”

“Kiu estas via kuzo? Ĉu li servas en la policejo?” demandis la portisto, kun okuloj malfermegitaj.

La studentino skuis la kapon: “Ne, mia kuzo estas instruisto. Li instruas en la elementa lernejo de Jangĝuang.”

“Aha!” la portisto kriis. “Kiu li estas? Mi konas ĉiujn instruistojn de ĉi tiuj vilaĝoj.”

“Ĝang Venking.” la studentino iom vigliĝis, kaj demandis naive: “Ĉu vi konas lin? Ĉu li estas en la vilaĝo? Kial li ne venis min atendi en la stacio? . . .”

La portisto eksilentis, kvazaŭ lia buŝo estus subite sigelita. La studentino fiksis sian rigardon sur lia nigrebruna kaj sulkiĝinta vizaĝo, atendante lian respondon. Sed li nenion diris. Post kelke da paŝoj, la portisto ŝanĝis la temon:

“Kiel vi nomiĝas? Ĉu vi venis de la ĉefurbo?”

Ankoraŭ iom infaneca, la studentino diris al li kun seriozeco: “Mi nomiĝas Lin Daŭging. Mi venis de Bejping. Ĉu vi konas mian kuzon?”

La portisto denove silentis. Post longa momento, li nur diris: “Oh, oh!” Oni ne sciis kion tio signifas. Ankaŭ la studentino nenion diris plu. Tiel ili venis al la pordo de la elementa lernejo de la vilaĝo Jangĝuang. La portisto foriris pagite. Lin Daŭging suriris, iom hezite, la peronon antaŭ la lernejo.

La lernejo havis sian sidejon en granda templo apud la vilaĝo. Lin Daŭging metis sian pakajon ĉe la pordo kaj paŝis en la templon. Ŝi serĉis en ĉiuj ĉambroj, sed trovis neniun. “Eble ili iris promeni sur la marbordo?” ŝi pensis, kaj povis nur atendi, starante sur la perono ekster la pordo de la templo.

Komencis vesperiĝi. Super ĉiu domo en la vilaĝo leviĝis kolono da fumo, signo de preparado de vespermanĝo. En la arbareto fronte de la templo, la cikadoj malespere grincegis pro la finiĝo de la tago. Aŭskultante la cikadan ĉirpadon, Lin Daŭging malpacience rigardis jen tien, jen ĉi tien, sed ŝi ne vidis eĉ ombron de homo, kvankam longa tempo pasis. Por gardi la pakajon, ŝi ne povis forlasi sian lokon. Nur kiam malaperis la krepuska lumo, venis ŝanceliĝante sur la vojo lama maljunulo. Vidante, ke iu staras sur la perono, li kriis de malproksime:

“Kiun vi volas viziti?”

Lin Daŭging rapide malsupreniris la peronon kun granda ĝojo, ke finfine alvenas homo. Ŝi alparolis la maljunulon: “Ĉu sinjoro Ĝang Venking instruas ĉi tie?”

“Oh, vi volas vidi sinjoron Ĝang? . . .” La maljunulo, ebria, respondis balbute, kun vizaĝo ruĝiĝinta: “Li, li jam ne instruas ĉi tie.”

Lin Daŭging estis surprizita.

“Kie li estas? . . . Li skribis al mi, ke dum la somera libertempo li ne forlasos la lernejon. Kaj lia edzino? Ankaŭ ŝi instruas ĉi tie. . .”

“Ne, . . . mi ne scias! Mi ne scias, . . .” Ĉiam pli ebria, la maljunulo stumble enpuŝiĝis en la templon, kaj bum! firme fermiĝis la pordoflugiloj.

Tio metis Lin Daŭging en grandan embarason: Kie estas la kuzo kaj lia edzino? Ŝi jam skribis al li, ke ŝi venos, sed li forestas. Kion ŝi devas fari nun? Kaj poste? . . . Sensente starante sur la soleca perono, ŝi najlis sian rigardon al la obskura arbareto antaŭ si. La cikadoj ankoraŭ malagrable ĉirpatis, kvazaŭ senfine. La maro, kvankam nevidebla, batadis la rokojn kaj eli-

gadis monotonajn plaŭdojn en la silento. Lin Daŭging forte frapis je la pordo de la templo, sed ĝi restis fermita; certe la maljunulo jam troviĝis en ŝtona dormo. Ŝia koro brulis pro maltrankvilo. Kun larmoj en la okuloj, ŝi staris sola, dum longa momento, ekster la enirejo de la templo. La luno leviĝis, kaj karesis per siaj briloj, kribritaj tra la folioj, la belan vizaĝon de la forlasita knabino. Sin apogante ĉe la ŝtona monumento antaŭ la templa pordo, ŝi mallaŭte ekploris.

En malĝojo, oni kutimas rememori la pasintaĵojn. Lin Daŭging, plorante, dronis en siaj rememoroj. Kial ŝi venis al tiu ĉi loko, kie ŝi havis neniun konaton? Kiel povis okazi, ke ŝi trovas sin sola antaŭ arbareto apud maro, en dezerta nokto? Pro kio ŝi forlasis siajn gepatrojn kaj hejman teron kaj vagis en tiu ĉi fremda loko? Pro kio ŝi ploris tiel dolore? . . .

(Daŭrigota)

\* Bejping, la malnova nomo de Pekino

## Por sekureco de fremdlandaj amikoj

de BIAN JUMEJ

**M**ATENE de la 19-a de oktobro de 1977, 20 membroj de la Vizita Grupo de Oficistoj de Ĝenevaj Internaciaj Organizo veturis de la urbo Anjang de Henan-provinco al la Kanalo Ruĝa Flago de Linhian-gubernio.

Aŭtoj kaj homoj iras sur la ŝoseo. En kampoj kaj sur montodeklivoj komunumanoj transportis teron kaj ŝtonon por konstrui kanalon. La aŭtobuso rapide kuris sur la pavimita vojo. Rigardante tra la fenestroj entuziasman laboron, la fremdlandaj amikoj interparolis en bonhumoro.

Por pli frue atingi Linhian-gubernion, la ŝoforo akcelis sian aŭton kaj tiu fluge kuris antaŭen. Kiam la aŭtobuso venis al la popola komunumo Magia ĉe la piedo de Tajhang-montaro, komunumanoj estis eksplodigantaj rokon. Kiam la aŭtobuso atingis la danĝeran zonon, postenanta komunumano mansignis al ĝi ke ĝi haltu. Sed la ŝoforo miskomprenis, ke li volas veturi kaj ne bremsis la aŭton pro la urĝeco. Tuj okazos serioza akcidento. Tiam iu maljunulo de ĉ. 60 jaroj kun ŝovelilo en la mano elpafiĝis kaj kuŝiĝis

meze de la ŝoseo por bari la aŭtobuson. La ŝoforo akre bremsis la aŭton du metrojn fore de la maljunulo.

“Danĝere! Jen eksplodigo!” Tuj post lia krio, pli ol 200 minoj eksplodis unu post alia. En palpebrumo densa fumo kaj polvo leviĝis, ŝtonpecoj de montodeklivoj disflugis en aero, kaj iuj falis sur la ŝoseon. La fremdlandaj gastoj estis tre kortuŝitaj de la heroaĵo de tiu maljunulo, iris el la aŭto, ĉirkaŭis lin kaj premis al li la manon, dankis lin kaj fotografis lin. Informiĝinte ke la maljunulo nomiĝas Hing Zide, la estro de la grupo forte premis al li la manon, dirante al siaj kolegoj: “Hing Zide savis nin malgraŭ la morta danĝero, kaj ekde hodiaŭ, ni nomu nian grupon per lia nomo por memori la bravan kaj senegoisman maljunulon.” La propono estis varme aprobita de la gastoj. Unu el la gastoj frapis ŝultron de Hing Zide kaj diris: “Vi vere estas viva Lej Feng. En la pasinteco, multaj okcidentanoj diris, ke tiaj okazaĵoj estas pura propagando. Nun ni propraokule vidis la aferon.”



La eksplodigo finiĝis kaj la aŭtobuso denove ekveturis. La fremdlandaj amikoj senĉese mansvingis kaj aplaudis al Hing Zide.

En la tria tagdeko de oktobro, antaŭ ol la Vizita Grupo de Oficistoj de Ĝenevaj Internaciaj Organizoj forlasis Ĉinion, 20 gastoj el 11 landoj kaj 10 internaciaj organizoj skribis en Pekino leteron al Hing Zide. En ĝi ili skribis: "Vi starigis por ni brilan ekzemplon de ĉina kampano, kiu ĉiam metas la popolan intereson en la unuan lokon. Tiu okazintaĵo estos ĉiam gravurita en nia koro."

pentrita de GIANG GENGHONG



## Nove ricevataj libroj

**Noto de la Red.:** De tiu ĉi numero ni notos sub tiu ĉi rubriko ricevatajn Esp-ajn librojn por sciigi al la legantaro kio aperis lastatempe en Esp-o. Ni rezervas al ni la rajton de elekto el la ricevataj materialoj.

**Tito kaj la nealiancitéco:** Eld. Esperanta-Societo Sarajevo, V. Pelagica 8/1, 71000 Sarajevo, Jugoslavio. Formato 13 × 21 cm, ilustrita, 40 pĝ, prezo 15 Din. plus 10% por sendkosto. Rabato por mendo de 5-99 ekz. 20% kaj de 100 kaj pli da ekz. 30%.

Broŝuro pri la mondpolitiko kaj pri la radikoj kaj bazoj de la jugoslavia decidiĝo por la nealiancitéco kaj pri la rolo de Tito en la kreado de la doktrino kaj movado de la nealiancitéco.

**De sezono al sezono:** Legolibro kompilita de Miyamoto masao, por japanaj lernantoj. Prezo: 700 jenoj. Kolekto da interesaj legaĵoj sur 72 paĝoj plus notoj en la japana sur 17 paĝoj. La legaĵoj mem kun varia temo estas bone uzablaj ankaŭ por aliaj landoj.

## Korespondi Deziras

\* F-ino Abram Vera, Celovska 144, 61000 Ljubljana, Jugoslavio, kun ĉl.

\* F-ino Nagovnek Magda, Grabličeva 8, 61000 Ljubljana, Jugoslavio, kun ĉl. gestudentoj.

\* Ramon Astrada, Est. 7, Maluinias Argentinas 1475, 5900 Villa Maria CBA, Argentino, pri diversaj temoj.

\* Francisco Rueda, Ancha, 21-10, Jaen, Hispanio, kun aziaj landoj.

\* Dudas Zoltan, Fr. Šopena 74, 24000 Subotica, Jugoslavio, kun 15-17j. ĉinaj esp-istoj.

\* Rodrigo Bernal G., Calle 60 No 40A 8, Medellin, Kolombio, kun ĉinaj junuloj.

\* Belak Ana, Gorazdova 7 61000 Ljubljana, Jugoslavio, kun ĉl.

\* Mušič Lojze, Jamčeva 18, 61234 Mengeš, Jugoslavio, kun ĉl.

## Vizito al la Urbo Eger

**L**A fama heroa antikva urbo Eger de Hungario situas ĉe la piedo de la monto Bukk, je pli ol 100 km. for de Budapeŝto en ĝia nordoriento. Antaŭ pli ol 400 jaroj, la armeo kaj popolo de la urbo faris bravan kontraŭagresan militadon por defendi la nacian sendependecon de Hungario kaj skribis per sia sango kaj vivo superban paĝon en la historio de la patrolando.

Antaŭ nelonge, mi vizitis la fortreson de Eger. Post pluraj jarcentoj restis al ĝi nur rompitaĵaj muroj, tamen ili bone servas kiel la postsignoj de la heroa batalo de la armeo kaj popolo de Eger kontraŭ la fremdlandaj agresantoj.

En septembro de 1552, post kiam la agresantoj de la Osmana Imperio okupis la plejparton de la teritorio de Hungario, ili faris fortan atakon al Eger, strikte sieĝante la urbon per 150,000 militistoj kaj intencante engluti la tutan landon. Tiutempe, en la fortreso Eger estis nur pli ol 2,300 hungaraj militistoj kaj popolanoj, inter kiuj troviĝis pli ol 400 virinoj. En tiu kriza momento, la armeo kaj popolo de Eger alfrontis severan elekton: ĉu kuraĝe leviĝi al rezistado aŭ surgenuiĝi antaŭ la malamikoj. La hungara nacia heroo, tiama fortresa komandanto Dabo Istvan, alvokis siajn armeon kaj popolon al rezoluta rezistado. Li diris: “La sorto de la patrolando estos decidita de nia fortreso. Se Eger falos, Miŝkolc kaj aliaj urboj perdiĝos. Tiam la turkoj akiros la aliajn fortresojn tre facile kiel rikolti de juglandoj, kaj al Hungario restos

nur ĝia nomo en la historio. La forto de la fortreso ne troviĝas en la ŝtonoj, sed en la koro de la defendantoj.” “Ni preferu morti, ol kapitulaci kaj fordoni la fortreson al la malamikoj,” solene ĵuris la armeo kaj popolo de Eger. Ili decidis kontribui sian ĉion por defendi la sendependecon de la patrolando.

Ĉiuj homoj unuiĝis por rezisti al la agresantoj. Ili konstruis grandajn kaj malgrandajn fortresojn lerte sur la ondiĝanta monteto. Sub la fortresoj ili fosis tunelojn longajn je pluraj kilometroj, profundajn je 30 metroj kaj larĝajn je 3 metroj por interligi la fortresojn. Dank’ al tiuj fortikaĵoj ili faris rezolutajn batalojn kontraŭ la malamikoj. En la tuneloj nun ankoraŭ konserviĝas siatempaj putoj provizantaj la defendantojn de la urbo per trinkakvo, fornoj uzataj por ripari armilojn, nigre fumajitaj fornomoj kaj grenadoj faritaj el argilo. Estas atentinde, ke en la tuneloj ankoraŭ troviĝas tiam uzitaj kanonoj kaj malamikaj obusoj. Tiam la defendantoj de Eger havis entute 16 kanonojn, dum la agresantoj pli ol cent. En la intensa batalo de 38 tagoj la malamikoj faris per bombardado la fortresan muron altan je 8 metroj kaj dikan je 2 metroj rubo kun alteco de 1 metro. Sed, la popolo batalanta por la patrolando estis nevenkebla. En tiuj tagoj la armeo kaj popolo foje-refoje repuŝis atakojn de la malamikoj, kiuj estis kelkdekoble pli multaj ol ili, kaj ekstermis pli ol 20.000 malamikojn.

La armeo kaj popolo de Eger estis ne nur kuraĝaj, sed ankaŭ lertaj en la batalo. En angulo de la tunelo konserviĝas du grandaj kaldronoj. En plej kriza momento de la batalo, mobiliziĝis ĉiuj loĝantoj, inkluzive de virinoj kaj infanoj. Mankis al ili armiloj, ili do verŝis boligitajn akvon kaj asfaltan kaj ĵetis brulantajn pajlojn al la eskaladantaj malamikoj. En la batalo la virinoj de Eger estis tre bravaj. Laŭdire, ili senhezite fortendis sian longan hararon por uzi ĝin kiel surogaton de iu materialo bezonata en farado de obusoj. Por solide bati la agresantojn multaj virinoj iris sur la batalajn postenojn anstataŭ la vunditaj viroj. Ĉe tunela kurbiĝo troviĝas truo kun diametro de ĉ. 1 metro, kiu estis loko por meti tamburon kiel alarmilo. La malamikoj ne povis konkeri la fortreson ĉe la fronto kaj komencis eksplodigi ĝian tunelan bazŝtonon. La defendantoj metis ŝaffelan tamburon ĉe tunela kurbiĝo kaj sur ĝi metis sojfabojn. Kiam malamikoj fosis muron por enmeti dinamiton, la sojfaboj saltetis, kaj tiam la defendantoj povis tuj scii tion kaj ĝustatempe apliki kontraŭrimedon.

En la komenco de la kuranta jarcento, hungara patriota verkisto Gardoni Geza priskribis tiun bravan batalon en sia romano “Steloj de Eger”, kiu kun dekelkaj eldonoj estis vaste akceptata de legantoj kaj filmigita en Hungario.

Hodiaŭ Eger jam disvolviĝis en urbon kun pli ol 45.000 loĝantoj kaj industrioj de cigaredoj, mebloj,

aŭtaj maŝinpartoj k. a. La vino de Eger estas fame konata. En la centra placo de la urbo staras bronza statuo de la tiama fortresa komandanto D. Istvan. Ĉiujare, ĉ. 600,000 hungaroj kaj fremdlandanoj vizitas tiun heroan antikvan urbon. Ĝi jam fariĝis simbolo de brava militado kontraŭ agreso kaj patriotismo de la hungara popolo.

En la pasintaj kelkcent jaroj, la sentima batala spirito de la armeo kaj popolo de Eger kuraĝigis la hungaran popolon en rezisto kontraŭ la agresoj de Turkio, Aŭstrio, Cara Rusio kaj la germanaj faŝistoj. La objektoj uzitaj de la tiamaj armeo kaj popolo de Eger en la rezisto kontraŭ la agresantoj estas

daŭre fositaj kaj riparataj, por ke ili servu kiel bona materialo por inspiri kaj eduki la nuntempulojn kaj posteulojn. Iu oficiso, kiu vizitis la antikvan fortreson de Eger kune kun ni, diris: "La hungara popolo profunde suferis de agresoj en la historio. En estonteco ni brave rebatos la invadantojn same kiel niaj antaŭuloj."




## Bonvenon al gasto el malproksima lando

de GI ĜE

**I**UN tagon de novembro de la jaro 1977, en la Popola Halo de Pekino Vang Ĝen, Vicĉefministro de la Ĉina Popola Respubliko, amike intervidiĝis kun neordinara blinda gasto Sinjoro Arnthor Helgason, prezidanto de la Islanda-Ĉina Kul-

tura Asocio, kaj la Islanda-Ĉina Kultura Delegacio sub lia gvido. Kiam Sinjoro Arnthor Helgason kaj liaj amikoj malrapide eniris en la akceptan salonon, Vicĉefministro Vang iris renkonte al ili, varme manpremis kun li kaj longe lin braku-

mis. Vicĉefministro Vang Ĝen kun grizaj haroj ĉe la tempioj laŭdis kaj dankis Sinjoron Helgason, ke li refoje venis al Ĉinio kun la delegacio sub sia gvido post la vizito en 1975, malgraŭ longa vojaĝo malfacila por blindulo, kaj alportis pro-



*Vicĉefministro Vang Ĝen intervidiĝis kun Arnthor Helgason kaj la membroj de la Islanda-Ĉina Kultura delegacio.*

fundan amikecon de la islanda popolo al la ĉina popolo. Sinjoro Helgason donacis al Vicĉefministro Vang Ĝen la islandlingvan libron «La Longa Marŝo — Poemoj de Prezidanto Maŭ». Tiu libro estis eldonita en Islando okaze de la 1-a datreveno de la forpaso de Prezidanto Maŭ je la 9-a de septembro, 1977. Antaŭ la eldono, li persone korektis la tradukaĵojn kaj skribis antaŭparolon por ĝi. Transdonante la libron al Vicĉefministro Vang Ĝen, li diris: «Mi sentas min tre feliĉa, ke mi povas donaci la libron al vi ĉina maljuna revoluciisto partopreninta en la Longa Marŝo.» Vicĉefministro Vang Ĝen ĝoje akceptis la donacon simbolantan profundan amikecon inter la popoloj de la du landoj, malfermis ĝian unuan paĝon kaj petis la islandajn amikojn subskribi por memoro.

Sinjoro Helgason estas malnova amiko de la ĉina popolo. Li estas 26-jara. En sia 14-jara aĝo li komencis koni Ĉinion. Nun li jam fervore laboris ĉ. dek jarojn por disvolvi la amikecon inter la ĉina kaj islanda popoloj. En marto de la lasta jaro, li estis elektita kiel prezidanto de la Islanda-Ĉina Kultura Asocio.

Sinjoro Helgason blindiĝis en infanaĝo pro malsukcesa operacio de la okuloj. Tiam li dronis en malespero. En 1966, li aŭdis de la Islanda Radio paroladon de islanda ĵurnalisto pri liaj tri vizitoj al Ĉinio. La ĵurnalisto parolis pri la revolucia optimismo de la ĉina popolo pri la vivo kaj la estonto kaj pri ĝia revolucia sentimeco al malfaciloj kaj brava antaŭenmarŝado en konstruado de la patrolando. Tio profunde kortuŝis lin. Li persiste aŭskultis programojn de la Pekino Radio en la angla lingvo kaj legis librojn distribuatajn de la ĉina librejo Guozi

Shudian. Por aŭdi pli bone li ŝaltis sian radioricevilon nur en profunda nokto. Por legi ĉinajn librojn kaj gazetojn li multe penis. En la komenco, li petis parencojn aŭ amikojn voĉlegi por li. En 1973 li aĉetis elektronikan legmaŝinon por blindulo. Nun li povas legi ĉiuj minute pli ol 50 vortojn.

Sinjoro Helgason tre estimas Prezidanton Maŭ. En la jaro 1966 li komencis studi liajn verkojn. Li diris, ke la verkoj de Prezidanto Maŭ helpis lin solvi mulajn problemojn kaj li decidis vivi kiel vera homo. En la pasintaj dek jaroj, precipe en la lastaj kelkaj jaroj, Sinjoro Helgason faris aktivan kontribuon por disvolvi la amikecon inter la popoloj de Islando kaj Ĉinio. Li ŝatas muzikon kaj ofte rekomendis al la Islanda Radio muzikajn programojn de Ĉinio. Kaj li ankaŭ prezentis kaj persone ludis ĉinajn muzikaĵojn en tiu radiostacio. Li ankaŭ entuziasme faris raportojn kaj skribis artikolojn por konigi la amikecon de la ĉina popolo al la islanda popolo, sukcesojn gajnatajn de Ĉinio en politiko, ekonomio, kulturo, eduko kaj aliaj aferoj kaj ĝian starpunkton en la internaciaj aferoj.

Veninte al Ĉinio Sinjoro Helgason prezentis al ĉinaj amikoj la laboron kaj vivon de la islanda popolo, por helpi ilin pli bone koni Islandon.

Parolante pri tiu ĉi vizito, Sinjoro Helgason diris, ke dum interparolado kun ĉinaj popolanoj li profunde sentis, ke post la faligo de la «kvarpersona bando» la ĉina popolo estas tre ĝoja, Prezidanto Hua ja estas bona daŭriganto de la afero de Prezidanto Maŭ kaj sub lia gvido la ĉina popolo certe povos konstrui sian patrolandon en modernan socialisman landon.



**L**A Lahu-a nacieco kun ĉ. 225,000 membroj loĝas ĉefe en la gubernioj de la okcidentaj montoj de Lancang-rivero en Junnan-provinco.

En la baseno de la rivero estas milda klimato, abunda pluvo kaj fekunda grundo, kio pretigis favorajn kondiĉojn por kresko de diversaj agrikulturaj plantoj. En profundaj montaroj ne nur kreskas diversaj valoraj arboj kaj drogherboj pseŭdo-ginsengo kaj aliaj, sed ankaŭ vivas multspecaj raraj bestoj kaj abundas subteraj mineralaj riĉfontoj.

La lahu-a lingvo apartenas al la han-tibeta lingvosistemo, kaj ĝiaj animalaj nomoj estas tute aŭ fundamente samaj al tiuj de la lisu-a kaj ji-a lingvoj. Tio montras, ke la lahu-oj havas intiman rilaton kun lisu-oj kaj ji-oj en la historio.

La lahu-a nacieco havas longan historion. Frue antaŭ pli ol 2,000 jaroj, iuj triboj apartenantaj al ji-a lingva branĉo inkluzive de la prapatroj de la lahu-a nacieco okupis sin pri ĉasado en la regiono de Erhaj-lago de okcidenta Junnan-provinco. Historia literaturo notis, ke tiam la triboj restis ankoraŭ en la primitiva socio senpatriarka kaj vivis per ĉasado en respektivaj klanoj. En la historio la lahu-oj estis fame konataj pro lerta ĉasado de tigroj. En la 8-a jarcento, post kiam la «Nanĝaŭ-a» loka registaro de Junnan-provinco starigis sian

# La Lahu-oj

de ZONG MIN

regadon, la prapatroj de la lahu-oj devigite transloĝiĝis suden grandnombre kaj en la 18-a jarcento ili fiksloĝiĝis ĝenerale en la nunaj lokoj.

La lahu-oj praktikas monogamion. La gejunuloj povas libere amindumi, sed post la edziĝo junulo plejparte loĝis en la familio de sia edzino kaj la sangorilato estas starigita sur la bazo de matriarkeco. En malmultaj lokoj junulo povas edziĝi kun junulino, nur post donado de donacaĵoj al la fianĉina familio pere de svatisto. Post la Liberiĝo, dank' al efektivigo de la nova edzeca leĝo, la malbona moro estis ŝanĝita.

La lahu-oj loĝas en etaĝdomoj el bambuo kaj ligno, similaj al tiuj de Taj-nacieco. La viroj plejparte kutimas porti senkoluman jakon oblikve malfermiĝantan ĉe la dekstra flanko, larĝtuban pantalonon kaj nigran kaptukon. La virinoj kutimas porti robon kun kolore borderita kolumo kaj kun rondaj arĝentaj ornamaĵoj sur la kolumo kaj dekstre malfermiĝanta klapo.

Antaŭ la Liberiĝo, la lahu-oj kredis politeismon kaj kultis Dion "Ehia", kiu laŭdire kreis la mondon, regis la universon kaj destinis homajn sortojn. La idolejo estis konstruita en profunda arbaro kaj fremduloj estis malpermesitaj proksimiĝi al ĝi. Krome ili adoris diojn de tero, tondro k. a. Post la Liberiĝo, kun rapida disvolviĝo de ekonomio

kaj kulturo, la primitivaj religio kaj superstiĉoj estas multe forlasitaj.

Kvankam lahu-nacieco ne havas sian skriban lingvon, tamen estas riĉa je buŝa literaturo ĉefe temanta pri ĉasado kaj agrikultura laboro. La tradiciaj muzikiloj estas blovinstrumento *Luŝengo*, trikorda plukinstrumento kaj aliaj.

En la tre longa tempo antaŭ la Liberiĝo, la ekonomio de lahu-nacieco disvolviĝis tre malrapide pro kruela subpremado kaj ekspluatado de reakciaj regantoj. Antaŭ la Liberiĝo, la socia ekonomio povis dividiĝi en du kategoriojn, feŭdan bienulan ekonomion kaj triban feŭdmastran ekonomion. La antaŭa inkludis la lahu-ojn de nordorienta Lancang-gubernio, Ĝenjuan-gubernio k. a. kiuj konsistigis la duonon de la tuta lahu-nacieca loĝantaro. Pro kontaktiĝo kun hanoj kaj ilia influo, relative rapide disvolviĝis la socia ekonomio de tiu regiono, oni ĝenerale uzis agrikulturilojn samajn al tiuj de hanoj kamparanoj kaj la bienuloj forprenis de siaj farmuloj 50% de iliaj rikoltaĵoj en formo de terrento. La lasta ekonomio multe pli estiĝis ol la antaŭa, ĝi konservis multajn signojn de la primitiva ekonomio. La lahu-oj loĝantaj en sudokcidenta Lancang-gubernio, Hiŝuangbanna k. a., kiuj vivis en subpremado de la taj-naciecaj tribaj feŭdmastroj, ĝuis nenian fundamentan homrajton, kaj ilia produktiveco estis tre

malalta. Ni prenu Fuĝanĝaj-vilaĝon de Hiŝuangbanna kiel ekzemplon: Ĝi havis 24 familiojn kun 181 loĝantoj kaj disponis nur 24 ferajn ŝpatojn kaj 4 hakilojn. Pro manko de feraj agrikulturiloj, lahu-aj kamparanoj devis uzi bambuajn tranĉilojn por falĉi fojnon, lignajn pioĉojn por dispecigi terblokojn kaj lignajn fosilojn por semado, kaj la produktokvanto de greno estis tre malmulta. La rikoltita greno sufiĉis nur por la bezono de tri-kvar monatoj kaj ili devis sin vivteni per sovaĝaj vegetaĵoj kaj ĉasaĵoj.

La laborema kaj kuraĝa lahu-a popolo ne volis toleri la subpremdon kaj ekspluatadon de la reakciaj regantoj kaj faris plurajn armajn insurekciojn. Precipe dum la lastaj pli ol 200 jaroj, la batalo de la lahu-oj pli kaj pli intensiĝis. En la jaro 1728, la lahu-oj, tajoj, hanioj k. a. de Ĝenjuan-gubernio faris ar-

*Lahu-a junulino*



man ribelon, forbruligis la oficejon de la loka registaro kaj ekzekutis gubernian mandarenon kaj tio skuis la regadon de King-dinastio. En 1796, la lahuoj, vaoj, bulangoj k. a. kune faris batalon kontraŭ tribaj feŭdmastroj de la taj-nacieco kaj la batalo daŭris kvar jarojn. De la komenco de la 18-a jarcento ĝis la tridekaj jaroj de la 20-a jarcento, la lahua popolo faris 20-30-foje armajn insurekciojn kune kun aliaj frataj naciecoj kaj la nombro de ribelantoj iam atingis dekmilojn. Dum la periodo de la Liberiga Milito, lahuaj popolanoj aktive aliĝis

al gerila taĉmento gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio por oponi kontraŭ reakcia regado de Kuomintago.

Post la Liberiĝo, niaj partio kaj registaro aktitve disvolvis diversajn laborojn en la regiono koncentre loĝata de la lahuoj. Pro longa obskura regado de la Kuomintanga reakcia registaro kaj lokaj militaristoj de Junnan-provinco, precipe pro bruligado, mortigado, rabado fare de la forkurantaj kuomintagaj trupoj dum la milito, la ekonomio de la regiono suferis tre grandan detruadon kaj la popolanoj

vivis tre mizere. Post kiam la popola registaro ĝustatempe donis helpon al la lahuoj per greno, semoj, bovoj, kotonŝtofo, salo kaj aliaj materialoj kaj senintereza kredito, ilia vivo rapide boniĝis kaj la ekonomio komencis restariĝi. En julio de 1950, la Centra Popola Registaro alsendis delegacion por viziti la lahuan regionon, kio donis grandan kuraĝigon al la lahuoj. Sub kora zorgado de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de KPĈ, la partia komitato de Junnan-provinco de KPĈ kaj la popola registaro de Junnan-

\*\*\*\*\*  
**ARKEOLOGIA**  
**ANGULO**  
 \*\*\*\*\*

## La Hjugiajaŭ-homoj

*Antaŭ ĉ. 100,000 jaroj, homoj jam vivis ĉe Hjugiajaŭ-vilaĝo en norda Ŝanhi-provinco de norda Ĉinio. Tion malkovris ĉinaj arkeologiaj laborantoj en sia esplorado en 1976 kaj 1977. La fosiliaj homoj trovitaj en tiu loko estas nomitaj Hjugiajaŭ-homoj. La grandarea restadejo de la Hjugiajaŭ-homoj kun abundaj materialoj estas rara inter tiuj de paleolitikaj prahomoj malkovritaj en nia lando. Ĝia malkovro havigis al ni novajn gravajn materialojn por studi pri la evoluo de la homaro kaj la disvolvigo de la homa socio.*

*Kiel oni trovis la Hjugiajaŭ-homojn? Kiu estis iliaj prapatroj? Kien iris iliaj posteuloj? Kiel ili vivis? Tiu ĉi artikolo verkita de la Esplora Taĉmento de la Hjugiajaŭ-a Prahoma Restadejo sendita de la Instituto de Pravertebruloj kaj Prahomoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj prezentas al vi la malkovradon kaj unuapaŝan atingon de ĝia esploro.*

### Serĉado de la mastroj de ŝtonaj iloj

En la jaro 1973, kiam ni faris arkeologian enketadon en norda Ŝanhi-provinco, ni vidis ĉe drog-aĉeta stacio eburan fosilion el Hjugiajaŭ-vilaĝo. Poste, ni faris esploron en la ĉirkaŭaĵo de tiu malgranda montvilaĝo en la norda rando de Datong-baseno. En kruta

bordroko proksime de la vilaĝo ni trovis multajn fosiliajn pecojn de vertebruloj kaj ŝtonajn ilojn.

Kiu uzis tiujn ŝtonajn ilojn? En 1976, ni komencis serĉi la mastrojn de tiuj ŝtonaj iloj. Ni formovis tavolon kun dikeco de 8 metroj en certa areo, malkovris la kulturatan terenon kaj zorge ĝin traserĉis. La ŝtonaj iloj kaj animalaj fosilioj en

ĝi estas tre multaj kaj diversspecaj. Inter ili troviĝis ŝtonaj kernoj, lamaj splitaĵoj, skrapiloj, pintaĵoj, boriloj kaj multaj ŝtonaj buloj, kaj krome ankaŭ frapitaj ostaj plataĵoj. Oni trovis, kune kun tiuj ŝtonaj iloj, fosiliojn de 22 specoj de animaloj. Laŭ la trovitaj fosilioj oni konstatis unuapaŝe, ke tiu restadejo apartenas al malfrua plejstoceno kaj ĝia kul-

provinco tre atentis pri la nacimalplimulto, multe eliminis la naciecan malakordon kaŭzitan de la reakciaj regantoj kaj plibonigis la naciecan interrilaton. Samtempe la Partio kaj la popola registaro energie kulturis lahuajn kadrojn, kio metis fortikan bazon por efektiviĝi naciecan aŭtonomecon. Je la 7-a de aprilo, 1953, fondiĝis la Lancang-a Lahu-nacieca Aŭtonoma Gubernio. Je la 16-a de junio, 1954, fondiĝis la Menglian-a Taj-kaj Lahu-nacieca Aŭtonoma Gubernio. La lahua popolo efektiviĝis naciecan aŭtonomecon kaj ĝuis

egalrajton inter ĉiuj naciecoj unuafoje en sia historio.

En la pli ol 20 jaroj post la Liberiĝo, forte ŝanĝiĝis la fizionomio de la lahua regiono. Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, persistante sur la socialisma vojo la lahua popolo ne nur starigis popolajn komunumojn en la kamparo kaj rapide disvolvis agrikulturan produkton, sed ankaŭ fondis industrion kaj grandnombre elkulturis laboristojn de lahu-nacieco. En ĉiu gubernio ĝenerale starigis fabrikoj de metalurgio, tekstilado, papero, agrikulturilo,

kemisterko, medikamento, fajenco kaj prilaborado de agrikulturaj kaj flankaj produktaĵoj. Kun disvolviĝo de industria kaj agrikultura produktado pli kaj pli disvolviĝas ankaŭ la aferoj de kulturo, eduko, scienco, tekniko, medikamento kaj higieno. Post frakaso de la "kvarpersona bando", sub direktado de la strategia principo elmetita de la saĝa gvidanto Prezidanto Hua "teni klasbatalon kaj ordigi la landon", la lahua popolo firme tenas revolucion kaj stimulas produktadon. Nun en la regiono de lahuoj aperis plena prospero.

turo apartenas al la meza periodo de paleolitiko antaŭ ĉ. 100,000 jaroj.

Printempo de norda Ŝanhi tre konvenas por eksterdoma laboro. Iutage, kiam ni estis priserĉanta tertavolon plenan de ŝtonaj iloj kaj animalaj fosilioj, subite iu ĝoje kriis: "Homa dento!" Mueldento de maljunulo vivinta antaŭ 100,000 jaroj estis elterigita, Hjugiajaŭ-homo estas fine trovita. Post kelkaj tagoj, ni trovis ankaŭ fosiliojn de kraniaj fragmentoj de Hjugiajaŭ-homoj kaj krome infanan maksilon kun kvar dentoj.

En 1977, ni faris pluan priserĉon ĉe la restadejo kaj trovis fosilion de pli kompleta kranio kaj grandan kvanton da ŝtonaj iloj kaj animalajn fosiliojn.

### **Idoj de la pekin-homoj**

Per dujara priserĉado, oni trovis jenajn fosiliojn de Hjugiajaŭ-homoj: 10 parietalojn (el kiuj 2 estas kompletaj), 2 okcipitalojn, 2 mueldentojn, 1 postan duonon de dekstra mandiblo kaj infanan maksilon kun kvar dentoj. Per tiuj materialoj oni povas scii la fizikajn trajtojn de la

Hjugiajaŭ-homoj kaj ilian pozicion en la evoluado de la homaro.

La trovitaj fosilioj de Hjugiajaŭ-homoj apartenis al almenaŭ pli ol dek viroj kaj virinoj. Laŭ la aspekto de la juntoj de la fosiliaj kraniaj, la difektiĝo de la dentoj kaj anstataŭiĝo de lakto-dentoj per definitivaj dentoj, oni povas certigi, ke

inter tiuj Hjugiajaŭ-homoj troviĝas infanoj de 7 aŭ 8 jaroj, geknaboj de dekelkaj jaroj kaj gejunuloj de 20 aŭ 30 jaroj kaj maljunulo de pli ol 50 jaroj.

La elstaraj karakterizoj de la Hjugiajaŭ-homoj estas tio, ke la kranio dikas je pli ol 1 centimetro, t. e. multe pli dika ol tiu de mo-

*La restadejo de Hjugiajaŭ*



derna homo kaj liaj dentoj estas dikaj kaj grandaj kun sulketoj similiaj al tiuj de la Pekin-homo. Tio montras, ke la Hjugiajaŭ-homoj ankoraŭ konservis primitivulajn trajtojn. Sed la Hjugiajaŭ-homoj rimarkeble diferencas de la Pekin-homoj. Ekzemple, la plej larĝa punkto de kranio de la Hjugiajaŭ-homo estas pli supra ol tiu de la Pekin-homo, la arkeco de la antaŭa estas pli alta, kaj la okcipitalo de Hjugiajaŭ-homo estas pli larĝa. Tio montras, ke la Hjugiajaŭ-homo estas pli progresinta ol la Pekin-homo. Ankaŭ la tipoj de la ŝtonaj iloj kaj la produkta tekniko pruvis tiun aserton. Tial ni opinias, ke la Hjugiajaŭ-homoj estas idoj de la Pekin-homoj, kiuj vivis antaŭ ĉ. 400,000 ĝis 500,000 jaroj. De la lasta duona jarcento, oni atentadas pri la demando kien iris la Pekin-homoj. Laŭ la materialoj pri la Hjugiajaŭ-homoj nun ni povas diri, ke post ŝanĝiĝoj de centoj da miloj da jaroj, la Pekin-homoj venis al norda Ŝanhi kaj iam loĝis ĉe

Hjugiajaŭ-vilaĝo antaŭ ĉ. 100,000 jaroj. Ili fariĝis la nomitaj Hjugiajaŭ-homoj. Laŭ nia konjekto, la Hjugiajaŭ-homoj estis en la rudimenta periodo de matriarka klana socio, loĝis en simplaj pajlaj budoj aŭ sub arbegoj, surhavis nenian veston kaj uzis nur ŝtonajn ilojn kaj lignajn bastonojn en produktado kaj ĉasado.

Kaj kien la Hjugiajaŭ-homoj iris poste? Pri tio ĉi ni jam trovis unuapaŝan respondon. Arkeologiaj laborantoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj trovis, ĉe Ŝiju-vilaĝo je centoj da lioj (1 lio=0.5 kilometro) sudokcidente de Hjugiajaŭ-vilaĝo, okcipitalan fosilion de Ŝiju-homo vivinta antaŭ pli ol 28,000 jaroj kaj ŝtonajn ilojn uzitajn de tia prahomo kaj grandan kvanton da bestaj ostoj restigitaj de ili post manĝado. Oni konstatis, ke la Hjugiajaŭ-homoj estas pli primitivaj ol la Ŝiju-homoj kaj la kulturo de la unuaj estas parenca al tiu de la lastaj, tamen la Ŝiju-homoj estis pli progresintaj.

*Profesoroj Jang Gonggian kaj Gia Lanbo kaj aliaj sciencaj esplorantoj en Hjugiajaŭ*



Do la unuaj estis prapatroj de la lastaj.

## La translokiĝo de la Hjugiajaŭ-homoj

La fosilioj de Hjugiajaŭ-homoj kaŝiĝis en sedimenta tertavolo je 8 metroj sub la tersurfaco, kaj tio malkaŝis al ni la ŝanĝiĝon de la natura fizionomio de Datong-baseno.

Antaŭ ĉ. 3 milionoj da jaroj, kiam la homoj aperis sur la terglobo, ĉe la loko de la nuna Datong-baseno estis vasta lago, kiun ni nomas Datong-lago. Dum la ekzisto de tiu lago, plurfoje okazis leviĝo kaj malleviĝo de la terkrusto kaj ŝanĝiĝo de la klimato.


Antaŭ ĉ. 100,000 jaroj, la akvo de Datong-lago kovris preskaŭ la tutan basenon kaj la loko de Hjugiajaŭ estis ĉe ĝia bordo.

Ĉe la restadejo de la Hjugiajaŭ-homoj oni trovis fosiliojn de multaj specoj de animaloj, inter kiuj estis testudo, struto, muso-leporo (*Ochotona sp.*), Brandt-a arvikolo (*Microtus brandtioides*), lupo, tigro, Naumann-elefanto (*Palaeoloxodon naumanni*), sovaĝaj ĉevalo kaj azeno, longhara rinocero (*Coelodonta anti-guitatis*), ruĝa cervo, grandkorna cervo de Hetaŭ, Przewalskii-a tibeta gazelo (*Procapra picticoudata przewalskii*), primitava bovo kaj apro. Plej multaj estas la fosilioj de sovaĝaj ĉevaloj, longharaj rinoceroj kaj gazeloj. Laŭ statistiko pri la dentaj fosilioj de sovaĝaj ĉevaloj oni konstatis, ke estis 364 sovaĝaj ĉevaloj. Tiuj animaloj estis ĉasobjektoj de la Hjugiajaŭ-homoj. La animalaj fosilioj kondukas al la opinio, ke en la tempo kiam vivis la Hjugiajaŭ-homoj, la klimato de norda Ŝanhi estis varma en la tuta jaro kaj la montoj estis plene kovritaj de verdaj arboj. Sur la bordo de Datong-lago kuris gregoj da so-



vaĝaj ĉevaloj kaj gazeloj tra vastaj herbejoj plenaj de floroj. Ni trovis tunojn da animalaj ostoj, sed neniun kompletan animalan skeleton kaj eĉ neniun sendifektan kranion. La ostoj estis plejparte rompitaĵoj dum manĝado aŭ farado de ostaj instrumentoj, kaj iuj el ili estis bruligitaj. Ni konjektas, ke la Hjugiajaŭ-homoj vivis tre mizere kaj formanĝis preskaŭ ĉion manĝeblan de la ĉasaĵoj inkluzive de ilia medolo.

La Hjugiajaŭ-homoj devis batali ne nur kontraŭ malsato, sed ankaŭ kontraŭ inundakvo kaj sovaĝaj bestoj. Ili vivis longe sur la lagbordo. Poste la lago terure ŝveligis pro pluvego kaj englutis iliajn loĝejojn, la kompatindaj Hjugiajaŭ-homoj devis forlasi siajn longe akumulitajn posedaĵojn — ŝtonajn kaj ostajn ilojn kaj animalajn ostojn kaj fuĝi aliloken. Poste, rivera kaj laga sedimento iom post iom kovris iliajn postlasitajn havaĵojn kaj fine ankaŭ Datong-lago malaperis kaj ĝia fundo fariĝis tersurfaco. Kaj pro tio, la restadejo de la Hjugiajaŭ-homoj kuŝadis je 8 metroj sub la tero dum 100,000 jaroj.



Amobirdoj

## KALEJDOSKOPO

### Amobirdo

**E**N Ĉinio vivas speco de kuriozaj birdoj nomataj amobirdoj (*Leiothrix lutea lutea*). Ili havas malpezan korpon, ruĝajn bekon kaj piedojn, kaj orajn, brilruĝajn, neĝblankajn kaj grizajn plumojn. Ili estas mildaj kaj graciaj kaj ŝatas kunvivi pare, pro kio ili ricevis sian nomon. Ili plaĉas al homoj precipe pro sia ĉarma trilo akuta kaj varia, tiel bela kiel tiu de alaŭdo. En printempo ili arope flugas kaj flirtas kun aliaj birdoj, kio donas multe da viveco al la naturo.

En la naskiĝlokoj de tiuj birdoj — Davej-montaro de Hunan-provinco kaj Ŝehian-gubernio de Anhuj-provinco — cirkulas multaj legendoj pri ili. Post kiam geamobirdoj fariĝis “bela paro”, ili ĉiam flugas duope, dormas kune kolon ĉe kolo, cedas manĝaĵon unu al la alia, kaj iam unu eĉ metas manĝaĵon en la bekon de la alia. Krome la amobirdoj estas tre “solidaraj”. Kiam ili estas atakataj de korvoj kaj agloj, ili kolektive faras kura-

ĝan kaj sagacan reatakon. Ili flugadas ĉirkaŭ kaj luktas kontraŭ ili, tiel ke la atakantaj rabobirdoj kapturigaĵas kaj devas forfuĝi.

La amobirdoj havas la kutimon flugi en aroj malsupren laŭ la direkto de montĉeno, tial ĉasistoj trioje instalas reton sur ilia kutima vojlinio. Apenaŭ aŭdiĝas iliaj plendpepoj, oni jam lerte kaptas kaj metas ilin en kaĝojn. Poste la birdoj estas bredataj en pura kaj komforta ĉambro speciale farita kaj estas nutrataj per ovoblanko kaj milio.

La amobirdoj estas ŝatataj de multaj ĉinoj kaj eksterlandanoj pro ilia interesa naturo. Nombro da fremdlandaj amikoj rigardas ĉinajn amobirdojn kiel trezoraĵon kaj zorge bredas ilin en elegantaj kaĝoj. Iuj prenas ilin kiel simbolon de amo kaj bonaŭguro kaj donacas ilin kiel altvaloraĵon al konatoj okaze de geedziĝo, datreveno de naskiĝo kaj aliaj festotagoj.



### NOVA KARBOKAMPO TROVITA EN ANHUJ-PROVINCO

En la provinco Anhuĵ riĉa karbokampo nomata Linhuan estas trovita. Laŭ la unuapaŝa esploro ĝia konservokvanto estas pli ol trioblo de la totala konservokvanto de la karboputoj de Huajbej. Ĝi havas diversajn speciojn de bonkvalita karbo nepre necesajn por metalurgio, movforto kaj kemiindustrio.

### FARINGA FOTILO

Nia lando sukcese faris sian unuan faringan fotilon, kiu estas bona instrumento por esplori kaj diagnozi fruperiodan faringan kanceron.


La aparato povas fari al paciento kolorajn fotojn por konstati staton kaj lokon de rinofaringa kancero kaj fari pliapaŝan ekzamenon pri detranĉita viva histo. Klinika uzado pruvis, ke ĝi estas bonkvalita. Ĝi povas foti preskaŭ la tutan faringon kaj klare reaperigi sur kolora foto delikatajn ŝanĝojn de fruperioda kancero.

La fotilo estas simpla, facile manipulebla, portebla kaj malkara, kaj taŭga por uzado en bazaj kuracejoj en urboj kaj kamparo. Post reformo tiu aparato nun povas esti uzata ankaŭ por fari kolorajn fotojn de laringo, timpano kaj utera cerviko.




S-ro M. Sakai, unu el la japanaj perantoj de "El Popola Ĉinio", forpasis en la 13-a de decembro, 1977 post longdaŭra malsano. Dum multaj jaroj li faris kontribuon al la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio kaj al la disvastigo de ĉinaj Esp. eldonaĵoj en Japanio. Lia forpaso estas perdo por ni.

Sinceran kondolencon al la familioj de S-ro Sakai.



*Lokoj menciitaj en artikoloj de tiu ĉi numero*

1. Tangŝan de Hebej-provinco
2. Hĵugiajau de Ŝanhi-provinco
3. Lancang-a Lahu-nacieca Aŭtonoma Gubernio de Junnan-provinco
4. Ŝanŝan de la Hingiang-a Uĵgura Aŭtonoma Regiono
5. Kaŝi de la Hingiang-a Uĵgura Aŭtonoma Regiono
6. Ŝikĵuanhe de la Tibeta Aŭtonoma Regiono



La nove konstruita Ĉangŝa-a Fervoja Stacio

Ĉangŝa havas historion de pli ol 2,000 jaroj kaj estas la politika, ekonomia kaj kultura centro de Hunan. Ĝia loĝantaro nombriĝas 820,000.


Ĉangŝa situas en la meza baseno de Jangzi-rivero. Sude de la urbo altas Vuling-montaro kaj norde kuŝas la lago Dongting. Ĥianggiang-rivero trafluas la urbon kaj ĝin trairas la Pekina-Kantona Fervojo kaj pluraj ŝoseoj. En la historio ĝi estis grava urbo en suda Ĉinio kaj unu el la kvar famaj rizaj komercejoj.

Antaŭ la Liberiĝo, Ĉangŝa estis konsumata urbo. En 1938, Kuomintangaj reakciuloj ruinigis la faman historian urbon pretekstante "reziston kontraŭ la japana agreso". Kaj pro tio, ĝis la Liberiĝo ankoraŭ restis tie detruitaj konstruaĵoj. Tiam oni povis vidi nur malmultajn bonajn domojn okupatajn de bienuloj kaj burokrataj burĝoj, dum la vasta laboranta popolo loĝis en malvastaj kadukaj kabanoj kaj baraktis kontraŭ la morto.


Post la Liberiĝo, Ĉangŝa aspektas pli kaj pli bela. La antaŭaj norda kaj suda ĉirkaŭaĵoj de la urbo okupataj de tombaroj, nun fariĝis industriaj distriktoj kaj loĝkvartaloj. En la pasintaj pli ol 20 jaroj post la Liberiĝo, la areo de la urbo sesobliĝis kaj la nombro de la nove konstruitaj kaj riparitaj domoj estas duoblo de tiu de la malnova Ĉangŝa. Plejparto de laboruloj de la urbo enloĝiĝis en novajn domojn. La nombro de entreprenoj havantaj pli ol 1000 personojn kreskis de 7 antaŭ la Liberiĝo ĝis 521. La totala produkto-



valoro de ĝia industrio de 1976 estis 24.4-oblo de tiu en 1949. Nun Ĉangŝa havas industriajn entreprenojn de fero, ŝtalo, maŝinfarado, elektroniko, kemio, tekstilaĵoj, manĝaĵo, malpeza industriaĵo, konstrua materialo k. a. En la Maŝina Fabriko de Ĉangŝa la produktado estas aŭtomatigita kaj duonaŭtomatigita kaj ĝi povas produkti pogranda grandajn kaj precizajn ilmaŝinojn de 38 specoj.




Riĉa rikolto de oranĝoj sur la insuleto Gjuziĝoŭ




La insuleto Gjuziĝoŭ

Kun la disvolvigo de ĝia industria produktado, progresas ankaŭ ĝiaj kultura, eduka kaj higiena aferoj. La urbo jam ĝeneraligis la edukon de supera mezlernejo. La nombro de superaj lernejoj multiĝis de 2 ĝis 8. La nombro de higienaj institucioj en 1976 estis 70-oblo de tiu en 1949. La stratoj de pli ol 400 kilometroj en la urbo tute estis asfaltitaj kaj la linioj de aŭtobuso multiĝis de 1 ĝis 15. La nova Ĉangŝa-a Fervoja Stacio havas plankareon de pli ol 20,000 kvadrataj metroj. La ponto super Hianggiang-rivero konstruita en 1972 havas 17 spanojn, 1,250 metrojn

Ponto super Hianggiang-rivero







kaj larĝas 20 metrojn. La branĉa ponto kun longeco de 282 metroj kaj larĝeco de 8 metroj kunliganta la insuleton Gjuziĝoŭ, unuigas la urbon kaj la pitoreskan monton Jueluŝan. La insuleto kaj la monto ambaŭ estis lokoj ofte vizitataj de

Prezidanto Maŭ Zedong por fari revoluciajn aktivadojn en lia juneco. Gjuziĝoŭ kuŝas en la rivero Hianggiang, longas 5 kilometrojn kaj maksimume larĝas ĉ. 300 metrojn. Jueluŝan-monto kiel pitoreskejo situas okcidente de la rivero. Sur la monto kreskas densa aceraro, kaj la foliaroj de la arboj fariĝas helruĝaj en aŭtuno, tiel ke la monto aspektas kvazaŭ tinkturita. El la kiosko Vanghiang sur la montpinto oni povas vidi la riveron, la insuleton kaj la urbon en la tuto.



Gejunuloj ĉe Hianggiang-rivero kie Prezidanto Maŭ iam naĝis.

Kiosko Ajvan sur Jueluŝan-monto



Vidindaĵo sur la insuleto

Ujgura danco "Sub  
Vinbera Laŭbo"



"Fratino Hia"



## Dancoj

"Feliĉa Festo de Ak-  
voverŝo" de taj-nacieco  
de Junnan-provinco




"Danco kun Longa  
Tamburo" de koreanino  
de Ĉinio









Ĉinaj

L U





DIL J



# Sun Vukong trifoje batis Skeletospiriton

(Daŭrigo)

Teksto adaptita de KIN KIN

Bildoj de VAN HIAŬJU



13.

La Skeletospirito ŝanĝiĝis en idolon en templo kaj la trompita Tang Seng surgenue riverencas al ĝi.

14.

Subite la Skeletospirito ŝanĝiĝis en monstron kaj kaptis, kun siaj subuloj, Tang Seng.

15.

Ankaŭ Ŝa Seng estis kaptita kaj Bagie traboras por si vojon por forfuĝi.



16.

Bagie venas al la Monto de Floroj kaj Fruktoj por peti Vukong kaj rakontas kun larmoj al li ĉion okazintan.

17.

La sagaca Sun Vukong decidis kapti la Skeletospiriton per ruzo kaj ordonis, ke Bagie antaŭeniru por batali, kaj li mem senbrue descendis de la monto.

18.

La Skeletospirito invitis sian patrinon por kune manĝi Tang Seng. Sun Vukong rimarkis tion kaj mortigis ŝin survoje.



19.

Sun Vukong prenis al si la formon de ŝia patrino kaj la monstro diris al li kun rido: "Jus mi kaptis Bagie, do ni formanĝu lin kune!"

20.

La Skeletospirito diris fiere, ke ŝi kvarfoje trompis Tang Seng. Tion aŭdinte la lasta larmas torrente kaj bedaŭras, ke li ne povis distingi homon de monstro.

21.

Subite Sun Vukong reprenis sian propran aspekton, prenis el la orelo sian magian bastonon kaj per ĝi mortigis la monstrojn kaj savis Tang Seng, Bagie kaj Sa Seng.



22.

La Skeletospirito fuĝis el la kaverno. Sun Vukong multobligis sin per magio kaj ŝin sieĝis.

23.

Sun Vukong elbuŝigis flamon kaj bruligis la Skeletospiriton.

24.

Nuboj ŝvebas inter montpintoj. Tang Seng daŭre iras al la Okcidento por akiri sutron kun siaj disĉiploj, timante nenian malfacilon.



8156

